

ZPRÁVY

ČESKOSLOVENSKÉHO ESPERANTSKÉHO VÝBORU INFORMOI DE ĈEHOSLOVAKA ESPERANTO-KOMITATO

Roč
ník
Jark

Číslo
(23-24) Numero

3-4

OSVETOVÝ ÚSTAV V PRAZE

Prosinec

PROSPERAN JARON 1967 AL SIAJ KUNLABORANTOJ DEZIRAS ĈEHOSLOVAKA ESPERANTO-KOMITATO KAJ LA REDAKCIO DE „INFORMOJ“.

NI ESTIS EN BUDAPEŜTO – KAJ KION PLU?

La 51-an Universalan Kongreson le Esperanto partoprenis 360 ĉeĥoslovakaj geesperantistoj. Do — kiel tion publike konstatis k-do Fr. Sviták, prezidanto de Ĉeĥoslovaka Esperanto Komitato — ĝi estis niaflanke la plej amase vizitita UKE verŝajne en la tuta historio de nia movado. Kaj apenaŭ ni havos en la proksima estonteco eblecon partopreni tiel nombre UKE, ĉar ili okazos en foraj landoj.

Tial aŭtomate ekestas la demando, ĉu ĉiuj ĉeĥaj kaj slovakaj ĉeestintoj tion bone konsciis kaj ĉu ili sufiĉe elprofitas la akiritajn spertojn por plua aktivado en nia movado?

Ni renkontis tie rondetanojn kaj klubanojn vere el nia tuta Respubliko; ni parolis kun multaj el ili, petante ilin, ke ili kontribuu al ni, ke ili informu nin pri siaj observoj, bonaj spertoj, kiujn ili povos elprofiti; ke ili sendadu al ni raportojn pri sia plua, postkongresa aktivado.

Bedaŭrinde ni devas konstati, ke nia redakcio — krom raraj esceptoj — ne estis kaj ne estas informata pri la instruaĵoj, kiujn oni kunportis el Budapeŝto; kiel ili efikis, efektivigis en ilia plia por- kaj peresperanta agadoj. Ĉu la multaj promesoj — kvazaŭ ŝtonoj kaj ŝtonetoj — falis en akvon: plaŭd kaj silento?

Ho, kiel ni ŝatus ekscii, kiel helpis al niaj esperantistoj la tutsemajna ĉeesto kaj aŭskultado de modelaj paroladoj kaj prelegoj, laŭ la lingva flanko? Kiel ĉiam, ankaŭ nun partoprenis komencantoj (ankaŭ la tiel nomataj eternaj komencantoj). Ĉu ili ricevis kaj akceptis la fortajn impulsojn al sia perfektigado, al finlernado de la lingvo? Espereble ni povos baldaŭ konstati, ke ili progresas, ke ili strebas al la „vivanta lingvo“ laŭ la difino de Prof. D-ro Ivo Lapenna (vidu la 2-an n-ron de niaj Informoj). Kvankam estas vero, ke nin multe malhelpas la manko de la ĉiutaga praktikado de la lingvo, ĉar ni uzas ĝin nur okaze, dum la rondet-kunveno (ĉu vere?), dum hazarda rekontiĝo kun amiko — esperantisto, kaj — skribe. Sen ofendo dirite, plejparte ni estas nur skribaj esperantistoj kaj troviĝas nur raraj esceptoj, kiam nia lingvo estas uzata en la familia vivo, kio estas konstatebla laŭ la flua, ĉiam senĝena kaj perfekta parolado, esprimmaniero de la koncerna esperantisto.

La pravecon de nia aserto pri la nesufiĉe alta lingva nivelo povas konfirmi ĉiuj, kiuj devas korekti la publikigendajn tekstojn de ĉiuspecaj informiloj, varbofolioj, ja

eĉ artikoloj. Kaj tio ne estas tute en ordo. Ĉu nur niaj verkistoj kaj lingvistoj regu la lingvon? Ĉu nur ili studu kaj plene respektu ĝiajn regulojn; la ĝustan prononcmanneron?

Bonvolu memori: pri kio oni ne skribas, ne raportas, tio ne estis farita, tio ne okazis — almenaŭ por la pli vasta publiko. Kaj se oni sendas raporton post duonjaro ja eĉ preskaŭ post unu jaro — oni ne plendu pri nia malaktualeco!

„Esperanto en la fakojn!" Tion ni aŭdis ankaŭ en Budapeŝto. Kion ni faras ĉirilate? Kvankam ni jam scias pri klopodoj fondi fakajn sekciojn (medicinan, teknikistan, instruistan ktp.), tamen ni ŝatus ekscii, ĉu niaj koncernaj fakuloj interesiĝas pri ĉi tiu gravega afero kaj aliĝas al la preparaj komitatoj?

Multaj el ni — ekvidinte la belajn eksterlandajn gazetojn, ŝatus ilin havigi al si. Tio estas en ordo. Sed ne estas en ordo, se oni poste neglektas, subtaksas la proprajn, ĉar ili estas modestaj, ĉekomencaj. Por eksterlandaj gazetoj multaj elspezus ĉiun monon, sed ili grumblas, esprimas strangajn opiniojn, se ili devas aboni, subteni per minimuma monofero ekz. niajn Informojn. Multaj kritikas, riproĉas, postulas, ke la gazeto estu tia kaj tia, aperigu tion kaj jenon, neparolante pri tio, ke ĉiu numero entenas ankaŭ literaturan aldonon, sed ĝin eĉ ne abonas!

Atendas nin „Opava 1967". Ĉiu unuopulo, rondeto, faka sekcio ktp. povos ĝin eluzi kiel montrofenestron de siaj perfektigado, aktivado, kontribuado al la komunaj aranĝoj, rimedoj, helpiloj por antaŭenpuŝi nian aferon. Ni ne restu individualistoj!

Eliz

ESPERANTISTA KULTURFESTIVALO „OPAVA 1967"

La ĉefa entrepreno de ĉeĥoslovakaj esperantistoj en 1967

Omaĝe al la 100-a datreveno de naskiĝo de Nacia Artisto Petro Bezruč, Esperanto-rondeto ĉe Uzina Klubo OSTROJ en Oprava organizas — sub aŭspicio de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato — la 7-10-an de julio 1967 Esperantistan kulturfestivalon „Opava 1967".

La festivalo estas envicigita en la tutŝtatan solenaĵon, okazontan plejparte en Opava, naskiĝurbo de Petro Bezruč. La programo konsistos el solenaj plenkunsidoj de ĈSEK kaj ĝiaj sekcioj, seminario pri literaturo, ekspozicio, arta programo kaj tuttaga ekskurso.

La 100-jaran jubileon de naskiĝo de Petro Bezruč UNESCO envicigis inter la mondajn kulturajn datrevenojn en 1967. Per la kulturfestivalo „Opava 1967" la ĉeĥoslovakaj esperantistoj omaĝos la poeton, al kies mondkonateco Esperanto ege kontribuis.

En la jaro de la 100-a datreveno de la naskiĝo de Petro Bezruč —kiel la 8-a n-ro de la serio „Oriento-Okcidento" — aperos la ĉefverko de Petro Bezruč: „Sileziaj kantoj", en Esperanta traduko de D-ro Tomáš Pumpr, Jiří Kořínek kaj Rudolf Hromada. (Antaŭmendojn akceptas Memordomo de Petro Bezruč, Opava. Tie oni povas ricevi senpagan Esperantan broŝuron kun pli detalaj informoj pri la vino kaj verko de Petro Bezruč.)

Dediĉu parton de via libertempo al la Esperantista Kulturfestivalo „Opava 1967"! Ĝis revido!!!

O. Kníchal

La nunaj taskoj de Esperanto-movado

La Jaro de Internacia Kunlaboro estis grava okazo por Esperanto kaj la movado. UEA la unuan fojon aliĝis al la grandskala kampanjo de UNO kaj UNESCO kaj prenis sur sin specifan funkcion sur la kampo de internaciaj interrilatoj kiel unu el la 104 neregistaraj organizoj de ĉi tiu kulturinstanco.

Por esperantistoj — ĉu prave aŭ ne — principan signifon havas nur la subskribkolektado kun la atendata rezulto por la movado. Ĉi-kaze ĉe esperantistoj ni rimarkas ian izoligon disde la baza tasko. Anticipe ni ne povas aserti, ke per la subskribkolektado — eĉ se ĝi estus plensukcesa — oni atingos tion, kion la movado jam longe sopiras akceptigi, nome la oficialan enkondukon de Esperanto en la lernejojn kaj internaciajn interrilatojn.

La ĉefa tasko antaŭ ĉio estas la kreo de fidinda bazo. Kvankam ni ne volas subtaksi la gravecon de la subskribkolektado, tamen ni povas diri, ke la ununura garantio estas la firma envicigo en la socian vivon.

Aŭtune 1965 okazis en Belgrado grava kunsido de Jugoslavia Esperanto-Asocio. La rezultoj, vicigitaj en unuopajn punktojn, povas esti rigardataj **alfabeto** de la laboro de iu ajn Esperanta organizo:

a) ĉesigo de neŭtraleco (por tio pledas ankaŭ la rezolucio de UNESCO en 1954 kaj de la Eŭropa Esperanto-konferenco en 1965).

b) estas necese multe pli intense aktivigi la esperantistojn kaj la civitanojn kaj la sociajn instancojn en la kunlaboro kun la interesataj organoj.

c) vastigi Esperanton precipe inter la laboristaro kaj junularo (la estonto de la movado estas grandparte problemo genera). Esperanto ne povas esti enkondukata en la lernejojn de supre, sed je postulo de vastaj popoltavoloj. Do estas necese larĝigi la **bazon** de ĉi tiu ebleco.

d) enkonduki Esperanton kien ajn estas eble (turismo, trafiko k. s.)

e) pli energie postuli la elastan plenumon de la **ĉefa** tasko, t. e. la envicigon de la movado en la vivon de la lando. Nur tiam oni povas atendi konstitucion de prosperanta amasorganizo.

f) daŭrigi la kadran propagandon de Esperanto t. e. akceptigi ĝin kiel faktoron klerigan kaj sciencan.

Tiom la belgrada kunsido. La interpretado de ĉiu tiu proaramo estas ŝtono de falpuŝigo por ne unu Esperanta organizo. (Rim. de la aŭtoro: De ĉi tiu labornivelo dependas ankaŭ la parta agado por Esperanto, kiu — izole — estas nur sencela kaj senfrukta).

Multaj pledantoj por la neŭtraleco de E. pensas, ke E. nur ĝiahelpe povas resti sendependa disde la nekonstantaj politikaj teorioj de la socio. Tiamaniere ili elmetas sin ankaŭ al la danĝero, ke la ideon de internacia lingvo la publiko neniam komprenos. Esperanto ne povas forturni sin de la epokoeventoj, same kiel ĝi ne povas nei sian mision. Kaj multaj esp-istoj kredas je sola savipoveco de interkomprenigilo. Do nemirinde, ke la ŝajno de sektaneco kaj politika abstinenco estas ofte kaŭzo de malintereso kaj supereca sinteno rilate Esperanton.

Kredeble multajn seriozajn esperantistojn indignigis la artikolo de iu praga gazeto (kvankam kun demandsigno en la titolo), nekonformanta al la vero. La

lapidara titolo: „Ĉu Esperanto savos la mondon?" estas bedaŭrinde transprenita opinio de la esperantista plimulto. Ĝi devenas el la idea esenco de la movado kiel kuracilo por la moderna malsano de la homaro. Kiel ĉiu movado, ankaŭ E. ricevis en la lulilon sian ideologion. Cetere Zamenhof ĉiuokaze akcentis, ke sub Esperanto li komprenas antaŭ ĉio komprenigilon inter apartenantoj al diversaj lingvaj sferoj, sed ne celon kaj la sopiratan paradizon.

La teoria nivelo de la movado estas ĝenerale malalta. Ĉiu certe koncedas, ke ne estas eble agi laŭ unu maniero, sed motivigi alimaniere, ĉar malkorektaĵoj en la praktiko venĝas sin ĉiam en la neĝusta teoria argumentado.

Hodiaŭ, konsiderante la pozicion de la internacia lingvo iom alimaniere ol estis kutime, ni ne povas agnoski la s a v a n t a n funkcion de Esperanto, sed ni devas alceli la revizion de ĉi tiu koncepto, ennestiĝinta en la ĉiutagan praktikon de la movado.

La resaniĝo devas nepre komenciĝi de interne, nur poste la laboro povos efiki ankaŭ eksteren. La novaj agadformoj renkontas ofte malkomprenon ja eĉ kontraŭstaron. Ekestas situacioj, kiam konscie farata laboro renversas sian celon. Inter ĉi tiuj ekstremaj punktoj kuŝas multe da strangaĵo kaj karikaturado, nesufiĉa sinpreparo de la funkciuloj, kun sekvaj eraraj propagando kaj informado (vidu la Principaron de Frostavallen — rim. de la aŭt.) La kluba kaj kleriga agadoj per siaj formoj kaj enhavo efikas malmobilige. Laŭ la ĝenerala opinio la propagando de E. en la socialismaj landoj estis bremsita pro nefavora politika situacio kaj la novajn kondiĉojn necesas eluzi por restarigo de la „kontinueco". Sed en ĉi tiu „kontinueco" jam respeguliĝas valortaksado. La malnovaj metodoj do restis kaj finvivis, kvankam la enhavo jam antaŭlonge ŝanĝiĝis, sed ne estis perceptata. Ĉi tiu alfiksiĝo evidentiĝis en la reago je la pli favoraj kondiĉoj en la lastaj jaroj. Ekestis ankaŭ opinio, laŭ kiu kvazaŭ la sola ekzistenco de la internacia lingvo devus instigi la respondecajn agantojn okupiĝi pri ĝi. Tial la mankojn oni serĉis ĉiam en la faktoroj eksteraj.

Nia opinio unu el la radikalaj provoj kiamaniere „reformi" la movadon kaj stimuli ĝian sangocirkuladon, estas la kampanjo de „Instituto por Oficialigo de Esperanto", kvankam pro la jam menciitaj kialoj, ĝi enhavas ankaŭ rizikon de entreprenado. La celo de la kampanjo de Sekelj evidente estas jena: per kvantitativa difuzo krei novan kvaliton, konforman al la pozicio de internacia lingvo en la nuntempo. Kune kun la kampanjo de UEA ĝi intencas motivigi la agadon de Esperantaj organizoj, rondetoj kaj unuopuloj.

(Esperantigis iz.)

Máte zájem o KONTAKTO?

KONTAKTO je mezinárodní esperantská mládežnická revue, vydávaná Světovou esper. mládežnickou organizací (TEJO). Vychází 4-5 X ročně v Holandsku. Na základě dohody s Ulrichem Linsem, pokladníkem TEJO, získala SM ČSEV možnost zprostředkovat odběr tohoto časopisu pro mladé československé esperantisty za celoroční předplatné 32 Kčs.

M. Nevan

Levná rekreace v Jugoslávii. Při návštěvě 7-členné skupiny našeho kroužku v Jugoslávii nabídli nám naši esperantští přátelé v Medulinu u Puly-Istrie obyvatelný

patrový rodinný domek s dvěma velkými místnostmi, asi pro 10 osob, se zahradou, použitelný po celou sezonu; a to velmi levně. Medulín je u moře, v rekreační vinařské oblasti s autokampingem a rybolovem. Bližší podrobnosti sdělí náš kroužek na požádání. Kroužek Esperanto při ZK SVIT ZPS, RŘ Gottwaldov:

Z III. PLENÁRNÍHO ZASEDÁNÍ V OSTRAVĚ

Konalo se 29. 10. 1966 ve Společenském domě VŽKG v Ostravě-Vítkovicích. Na zasedání byla projednána zpráva představitelů EK v Opavě k připravovanému esperantskému kulturnímu festivalu, který bude uspořádán v příštím roce v rámci celostátních oslav 100. výročí narozenin Petra Bezruče v Opavě.

ČSEV projednal zprávy o konaném 51. Světovém sjezdu esperantistů a IV. mezinárodní konferenci Světového mírového esperantského hnutí (MEM) v Maďarsku. Zabýval se přípravou plánu činnosti a rozpočtu na r. 1967. Hodnotil práci redakční rady pro Zprávy ČSEV a esperantskou rubriku v OP, a konečně i výsledek dosavadního stavu v získávání předplatitelů našeho listu — Zprávy. A právě zde muselo plénum ČSEV vyslovit neuspokojení a starost nad dosaženými výsledky. Muselo konstatovat, že počet získaných předplatitelů — 500 — zdálky neodpovídá často vyslovovaným požadavkům většiny našich esperantistů, abychom měli svůj časopis. Nutně se proto vynořují otázky: kde je oněch 4.000 esperantistů, registrovaných v současné době v esperantských kroužcích?; co dělají výbory téměř 130 kroužků?; mají zájem aby vůbec vycházel esperantský tiskový orgán, který je pro každé hnutí a i pro naši organizaci neodmyslitelným pojítkem a organizačním pomocníkem?

Byly již několikrát — pravda — vysloveny námitky, že Zprávy v nynější podobě nejsou tím požadovaným listem, po němž již dlouho voláme. Ano, do jisté míry to je pravda, chceme jistě, abychom měli list pravidelně a častěji vycházející než dosud. Je však potřebné, abychom k tomu nejdříve vytvořili předpoklady, z nichž první je účast všech našich esperantistů na jeho zajištění a to je především otázka hospodářská, bez níž nikdy požadovaný časopis vydávat nemůžeme. Proto nechť i toto konstantování je podnětem a návodem k urychlenému zvýšení počtu předplatitelů, v čemž přední úlohu musí sehrát výbory kroužků v řadách svých členů i ostatních esperantistů, kteří žijí mimo jejich okruh.

Naše úloha v současném období je především v promyšlené popularizační organizátorské a agitační práci, bez níž bychom se nepohnuli z místa. Plénum ČSEV přijalo také usnesení podle něhož by péčí EK při PKO v Brně byly rozesílány kroužkům cenné informace z esperantského světa jako podklad pro výbory EK k informování svých členů. Připravuje se k vydání propagační leták pro neesperantskou veřejnost v českém znění, který by sloužil k další popularizaci esperanta a jeho cílů. Ještě letos vyjde i vhodná informační publikace o esperantu „Příručka mezinárodního jazyka esperanta“.

Zasedání projednalo také otázky týkající se dalšího rozvoje esperantského hnutí v naší republice a spolupráce s veřejnými a společenskými organizacemi. Přitom se obrací na všechny naše kroužky, aby více než dosud zaměřily svou

činnost v tomto směru a plně spolupracovaly především se svými zřizovatelskými organizacemi, závodními kluby, osvětovými besedami, PKO, kulturními zařízeními a j. institucemi a aby prostřednictvím svých členů byly s nimi v praktickém styku.

Jen tak se nám podaří účinně uplatňovat vliv na veřejnost a získávat jí pro naše cíle. ČSEV

SEVEROMORAVŠTÍ ESPERANTISTÉ SNĚMOVALI

Ve dnech 29. a 30. října tr. se konalo pod záštitou ČSEV setkání esperantistů Severomoravského kraje. Organizoval je kroužek esperantistů Domu kultury pracujících VZKG v Ostravě-Vítkovicích. Zúčastnilo se ho 98 zástupců esperantských kroužků z Ostravska i ostatních krajů republiky, členové ČSEV a další hosté.

Program setkání byl pracovní; projednány byly zprávy o 51. Světovém sjezdu esperantistů a IV. konference Světového mírového esperantského hnutí v Maďarsku; zpráva o činnosti plánu pro příští období sekce mládeže a esperantské mládeže na Ostravsku — byta projednána spolupráce esperantského hnutí se společenskými organizacemi a další aktuální otázky.

V rámci setkání byly uspořádány některé další akce, mj. prohlídka města a jeho zajímavostí; návštěva Městské nemocnice v Ostravě se světovou novinkou — hyperbarickou komorou; účastníci setkání shlédli několik zajímavých filmů s esperantskou verzí, hudební a pěvecké pořady, jež připravili ostravští esper. mládežníci a kulturní soubory — pobavili se na tanečním večírku ve Společenském domě a. j.

Setkání bylo zdařilé, výborně organizované, dík obětavým a velmi schopným ostravským soudruhům; mělo vysokou úroveň jednak z hlediska obsahu zpráv, rozpravy přítomných zástupců a hostů i pokud jde o vytvořené prostředí; přineslo přítomným dobré zkušenosti a podněty pro další cílevědomou práci v jejich kroužcích.

Celým jednáním se nesla myšlenka dalšího rozvoje a popularizace esperanta v řadách veřejnosti a šíření cílů esperantského hnutí: podílet se na společném úsilí všech pokrokových a mírumilovných sil ve světě a spolupráci a přátelství mezi národy, proti agresivním a útočným válkám, za mír, pokrok a demokracii — prostřednictvím mezinárodního jazyka esperanta.

Na setkání byla přijata rezoluce proti soudobé agresii USA ve Vietnamu a usnesení k práci E-kroužků v dalším období.

Usnesení:

1. Provedeme ve všech esperantských kroužcích další nábor pro odběr Zpráv ČSEV tak, aby každý člen si Zprávy předplatil.

2. Každý kroužek vejde ve styk se závody a organizacemi v místě za účelem vydání propagačního materiálu v esperantu.

3. Navázat styk a nabídnout spolupráci krajským výborům obránců míru a ostatním společenským organizacím.

4. Zvolit ve výborech EK dopisovatele pro Zprávy ČSEV.

5. Vysílat delegáty kroužků na krajské a celostátní aktivity.

ESPERANTO — významný pomocník v boji za světový mír

Tak jako 51. Světový sjezd esperantistů — konaný letos v Budapešti byl významnou událostí v životě esperantistů a celého esperantského hnutí, IV. konference MEM Světového mírového esperantského hnutí, která se konala v rámci tohoto sjezdu — byla důležitým mezníkem světového mírového esperantského hnutí.

Konference měla odraz i v ostatním mírovém hnutí a vyvolala živý zájem o MEM a jeho práci jako ještě nikdy před tím. Skutečnost, že se konference konala pod záštitou Maďarské mírové rady (MMR) a že nově zvolený mezinárodní výbor MEM byl pozván jejími pracovníky k přátelské besedě do sídla MMR v Budapešti svědčí o významu, jaký je v současné době přikládán Světovému mírovému esperantskému hnutí.

Do pracovního předsednictva konference vedle tajemníka Světové rady míru profesora Matkovského a představitelů Maďarské mírové rady, zástupců Sovětského svazu, Bulharska a některých vedoucích pracovníků sekretariátu MEM, byl zvolen také vedoucí československé sekce MEM, který zde současně zastupoval Československý výbor obránců míru a jeho jménem také vystoupil.

Konference se zúčastnilo 420 mírových pracovníků, zástupců zemských sekcí a výborů MEM a další aktivisté z 27 zemí, mezi nimi i početná delegace z Československa. — Konala se pod heslem „Esperantem za světový mír.“

K problémům mezinárodní situace a otázkám mírové práce zde hovořil předseda MEM Nikola Aleksiev; o činnosti této instituce mezi třetí a čtvrtou konferencí podal zprávu dosavadní generální sekretář Anton Balague; za Světovou radu míru pronesl projev její tajemník profesor Matkovskij; hovořili také zástupci zemských esperantských sekcí a výborů MEM a také zástupci neesperantských celostátních organizací.

Konference přijala několik rezolucí a usnesení — mimo jiné k agresi USA ve Vietnamu, k praktické spolupráci se světovou radou míru a celostátními neesperantskými organizacemi a hnutími; bylo usneseno vejít ve styk a spolupracovat se všemi kladnými mírovými silami ve světě, s dělnickými, mládežnickými, ženskými a dalšími organizacemi a hnutími a to jednak za účelem vytvoření co nejširší akční fronty těchto sil ale také k praktickému a účelnému využívání mezinárodního jazyka esperanta na ostatních úsecích mezinárodních styků.

Pokud jde o přínos, jakým se podílí naše československá sekce na práci a výsledcích Světového mírového esperantského hnutí vůbec, je možno posoudit podle výsledků voleb do nového mezinárodního výboru a podle uznání jakého se nám na konferenci v Budapešti dostalo: mezi 23 členy nově zvoleného výboru jsou 3 Čechoslováci; do předsednictva a do funkce tajemníka byl zvolen tajemník ČSEV a vedoucí čs. sekce MEM Tomáš Balda, do mezinárodní komise mládeže, jako její vedoucí by zvolen člen vedení čs. sekce mládeže Egon Moravec a do komise žen předsedkyně čs. komise žen Jana Cíchová.

Předsedou MEM byl znovu zvolen významný veřejný pracovník z Bulharska Nikola Aleksiev, generálním tajemníkem švéd Gösta Holmkvist a vedoucím

redaktorem časopisu PACO znovu Wiliam Gilbert z Francie. Jinak v novém mezinárodním výboru jsou zastoupeni soudruzi z Rakouska, Švédska, Vietnamu, Japonska, Sovětského svazu, Itálie, Maďarska, Polska, Anglie, Německé demokratické republiky, a Jugoslaviie. Hlavním administrátorem časopisu PACO se stal dřívější generální sekretář Anton Balague.

V rámci MEM pracuje 6 mezinárodních komisí se specifickým zaměřením; pro mírovou politiku, pro mezinárodní styky, pro kulturní práci, mládežnická komise, ženská a vydavatelsko-propagační. V nich jsou zastoupeni zkušení pracovníci z různých zemí světa, z nichž jak jsme již řekli i z Československa.

Co je možno říci v závěru: IV. konference MEM byla jednou z nejvýznamnějších mírových akcí v období od II. světové války na níž i esperantisté řekli své rozhodné slovo; byla zde znovu a bezvýhradně vyslovena zásada proti jakékoli nezdravé neutralitě jde-li o otázky míru a války, agrese, rasové a národnostní diskriminace, o otázky útisku a ponižování. Projevila se zde vysoká aktivizace mírových sil celého světa při níž se jasně projevila úloha a význam esperantského hnutí, které v současném i budoucím období musí sehrát tu úlohu, která s ohledem na jeho zaměření — již od jeho vzniku — je pro tyto úkoly přímo předurčena.

V tomto smyslu byla na konferenci i na ostatních setkáních s rozhodujícími činiteli světového mírového hnutí vysoce vyzdvižena naše práce a vysloveno přesvědčení, že i v budoucnu budou českoslovenští esperantisté stát v prvních řadách pokrokových a mírových sil ve světě.

Tomba



Delegito de UEA

Al la 65a naskiĝtago de Jaroslav Šustr 6. XII. 1966.

En la ombro de preĝejo
kaŝas sin strateto
jes, da tiaj tra la urbo
estas tuta reto.

En la strato staras domo
— fakte nur dometo —
de l'preĝejo ĝi distancas
eble je ŝtonĵeto.

Deĉifrinte la tabulon
miras la pasanto —
laŭ ĝi en la domo loĝas —
Nigra elefanto.

Nevidite, neaŭdite:
tia granda besto,
ke ĝi vere povus loĝi
en la eta kesto?

La fremdulo havas kaŭzon
nur denove miri,
se lin la scivolo puŝas
tra la pord' eniri.

Elefanton li ne trovas,
tio estas klara,
sed la ejo estas nigra
pro la lum' avara.

Kiam li malfermas poste
en mallum' palpebrojn,
la okul' kun miro vidas
librojn, librojn, librojn.

Libroj estas en la ŝrankoj,
libroj sur la tablo,
eĉ sur seĝoj staras libroj
ĉe la mur' en staplo.

Meze de ĉi trezorego
— ne sur ĝia pinto —
ĉe modesta tablo sidas
ĝia kolektinto.

Alta viro, laborema
kaj ne malkuraĝa,
ĝis la nuko etendiĝas
lia frunto saĝa.

Ĉiu libro en la ejo
venis tra la manoj
kiuj ĝuste ion skribas
al samideanoj.

Eble temas ĉi letero
pri la interŝanĝo,
eble mendo de la libro,
— nepre ne pri manĝo.

Ĉar nur ŝajne sidas
tie homo izolita
inter tiuj ĉi kvar muroj
malliberigita.

Vere estas li ligita
kun la tuta mondo
spite al sennombraj mejloj
en spirita rondo.

Centoj da samideanoj
lian helpon petas
kaj li eĉ trans oceanojn
ĉiam helpi pretas.

Jen sciigon iu volas
pri afero ia
dua serĉas sian nevon,
edzperanton tria.

Kaj li skribas, telefonas,
serĉas kaj informas,
delegito sen prolito
kiam li nur dormas?

Li laboras gaje, prete,
nepre ne por pano.
Iel tiel vivos iam
vera homarano.

Fx.

ESPERANTO EN LA PRAKTIKO

26 partoprenitoj en, la kongresvojaĝo de Centra Dana Esperantista Ligo survoje al la kongreso en Budapeŝto haltis du tagojn en Praha.

La gvidanto skribis en Esperanto al la ŝtata entrepreno Ĉedok kaj petis pri esperantlingve parolanta gvidisto. Ĉedok disponigis al ni ĉarman sinjorinon Jana Cíhová.

Ŝi ŝajne konas Pragon kiel sian propran poŝon kaj en flua kaj bela Esperanto ŝi malkovris por ni la plej belajn kaj vidindajn lokojn de sia urbo.

Ĉiuj partoprenintoj esprimis tre grandan kontenton pri la rondveturado kaj la okazo montras, ke Ĉedok jam oficiale uzas Esperanton.

Gustav Kühlmann
gvidanto de la kongresvojaĝa
sekcio de C. D. E. L.

CENTRA DANA ESPERANTISTA LIGO

Kongresvojaĝa Sekcio
Lovetandsvej 31.
Kopenhago Brh.

Al s-ino Jana Cíhová... 12.9.1966.

Kara samideanino, unue koran dankon pro bona gvidado de nia karavano tra via bela urbo, vere ĉiuj partoprenintoj esprimis al mi grandan kontenton pri tiu bonege planita ekskurso, per kiu oni kvazaŭ en „nuksoŝelo" ricevis vere kontentigan impreson de la riĉaĵoj de via urbo.

Post tiu rondeveturo ni pli bone komprenas, kial oni nomas Pragon: La Ora Urbo, kaj vi vere kulpas, ke multaj el ni ŝatus reveni por pli profunda studado de la urbo.

Mi almetas artikoleon, kiu eble aperonta en iu el viaj gazetoj kaj revuoj altiros atenton de Ĉedok, kio nepre estos bona . . .

Plej sincere via
Gustav Kühlmann
gvidanto de la karavano

EL LA AGADO DE JUNULARA SEKCIO DE ĈSEK

Tuj post la fondo de JS de ĈSEK ni eklaboris en du direktoj: interna kaj ekstera. La unua signifis kaj postulis la aktivigon de ĉiuj, ĝis tiam ekster la movado starantaj esperantistoj-gejunuloj. La duan karakterizas multflanka kaj diversspeca klopodo celanta ampleksan informadon de la juna publiko koncerne la internacian lingvon. La rezulto estas bona, tamen ne plene kontentiga. Kompare kun la pasinta periodo, nia nuna organiza formo ebligas pli seriozan kaj sisteman laboron. Ni estas fieraj pro la fakto, ke nia sekcio apartenas al la plej agemaj sekcioj de ĈSEK.

Por ricevi informojn pri la junularaj centroj en nia respubliko, la labor-komitato eldonis specialan cirkuleron, direktitan al la gvidantoj de ĉiuj E-rondetoj, kluboj ktp. Rezultis kolekto de proksimume 100 adresoj. Je ili ni sendis novan informleteron kun intenco aligi kaj interesigi nian junan esperantistaron. Paralele kun tiu ĉi alvoko ni aperigis esperantlingvan informilon celanta vastan publikigon eksterlande. Laŭ la decido de la estraro ni komencis eldonadi neregulan ĉeflingvan informilon Zpravodaj. La unua 5-paĝa numero aperis dum marto 1966 kaj krom diversaj sciigoj ĝi anoncis la 1-an TAJE en Praha. La dua n-ro estis dissendita du semajnojn post la menciita aktivular-kunveno. Ses paĝoj estis plene dediĉitaj al tiu nia aranĝo. La tria, junia n-ro raportis pri la propono de Lída Soběhartová, okazigi la 2-an TAJE en Olomouc komence de septembro. Krome al la junulara publiko ĝi prezentis laborplanon por la venonta periodo.

Tuj post la informo, ke en Ĉeĥoslovakio aktivas junulara esperantista movado, ekinteresiĝis multaj esp-istaj junularorganizoj, precipe en la socialismaj landoj. Ni ligis kunlaboron kun HEJ, JEJA, BEJ, E-junularo en GDR kaj aliloke. En Pollando dum la 2-a studenta seminario en Toruń estis reprezentita nia sekcio. Ne nur interesajn travivaĵojn sed ankaŭ multajn spertojn alportis niaj komitatanoj, kiuj je la rekomendo de la estraro de ĈSEK partoprenis internaciajn junularajn Esperantajn aranĝojn: en Bulgarujo, Francujo, Germanujo, Nederlando, Jugoslavujo, Pollando kaj Hungarujo. Por nia laboro la plej grava estis nia oficiala ĉeesto dum la 22-a IJK en Pécs, kie el Ĉeĥoslovakujo partoprenis 19 gejunuloj. La estraro de TEJO alte taksis la agadon de Junulara Sekcio de ĈSEK kaj decidis akcepti nian reprezentanton en la komitaton de TEJO. Samtempe ĝi esprimis la esperon, ke la ĉeĥoslovaka Esperanta junularo oficiale aliĝos al TEJO. Por nia enlanda movado tiu ĉi honorigo signifas novan sugeston, pluan entuziasmigon.

Bedaŭrinde la tuta laboro koncentriĝis en la manoj de nur kelkaj aktivuloj precipe en Praha. Mi estas konvinkita, ke en la sekvanta periodo niaj laboro kaj taskoj estos proporcie dividataj!

(Laŭ la raporto de M. Nevan).

GRATULON AL LA NOVGEEDZOJ!

Nikolao Nevan, la tre agema gvidanto de la Junulara fako de la ĈSEK, kies iniciato kaŭzis, ke nur en Prago subite elkreskis 5 novaj kursoj por junularo, ne parolante pri aliaj fruktoj de lia laboro en aliaj urboj, estas same agopreta ankaŭ en sia privata vivo. Tion li pruvis la 31an de oktobro 1966 en la malnovurba magistrata domo de Prago, kie li edziĝis al sia malnova, tamen juna kunlaborantino Jarunjo Kloubková.

Ni elkore gratulas al la novgeedzoj kaj sincere deziras, ke ilia plua poresperanta laboro ne konfirmu la veron de la konata verso de R. Schwartz: „edzino — fino”.

La Esperantlingva rondeto en la Esperantista klubo en Prago dediĉis al la juna paro la Faraonon de Prus — Kabe kun versetoj.



Gesamideanoj Nikolao Nevan kaj Jarunjo Kloubková post la edziĝ-ceremonio.

Kara duopo Nevana,
eble montriĝos nevana
noto gesamideana:
Vi, estante nun tro eta
familio nekompleta,
certe baldaŭ faros ion
por kompletigi familion.
Sed ne tuj kaj ne tro haste
gepatriĝu senprokraste
kiel hastis vi ĉi-faron
pliigante junularon.

Permesu al ni, tre modeste
proponi al vi — nur sugeste:
Nun vi finfaru vian faron,
esperantigu junularon,
por ke la junaj ge-Nevanoj
kresku jam kiel Ĝenevanoj
en medio hom-racia
klara kaj internacia.
Dume legu Faraonon,
plifirmigu vian konon. Fx.

Plua esperantista geedziĝo

D-ro Teodoro Rosinský, ĉefkuracisto de psikiatria malsanulejo edziĝis al
D-rino Lena Kotorová, en Nitra. Koran gratulon!

PLUAJ ETAJ GLOSOJ EL LA 51a UKE EN BUDAPEŝTO

Dum la solena inaŭguro inter la 42 reprezentantoj de la lokaj asocioj salutis la Kongreson ankaŭ la angla reprezentanto. Li diris proksimume jenon:

— Inter raciaj kaj saĝaj homoj ne ekzistas hodiaŭ duboj, ke ĝenerala enkonduko de la internacia lingvo estas nur demando de tempo. Tamen ekzistas homoj, (kaj mi ilin tre beraŭras), kiuj pensas, ke tiu internacia lingvo povus esti la angla. Se vi hazarde renkontos tian homon en la societo, bonvolu flustri en lian orelon jenan mian mesaĝon:

Por lerni la anglan lingvon, oni bezonas 25 000 horojn da pena laboro. (Mi mem bezonis 50 000 horojn, ĉar mi estas profesoro de la angla.) Tamen ili ne pensu, ke tio estas ĉio. Ĉiujare ekestas novaj idiomoj, kiujn oni devas lerni, tiel ke la anglan oni devas studi la tutan vivon. — —li—

Ĉe tagmanĝo mi konatiĝis kun Usonano. Li iomete moke parolis pri la prezoj kaj salajroj en Hungario rilate al Usono. Mi demandis, kion oni diras en Usono al la milito en Vjetnamio. Li respondis: — Neniu ŝatas militon, kaj ĉiu bonvenigus, se ĝi jam finiĝus. Tamen nia prezidento donis la vorton, ke ni helpas al la Sudo, do ni devas teni la vorton. — — Bone, mi diris, la vorto estis eble donita al la gvidantoj. Sed se vi hodiaŭ demandus iun meznombran vjetnamon, kiel estas ekzemple mi aŭ vi, ĉu li nepre volas, ke la vorto estu tenata, kion vi konjektas, ke li respondus? —

— Certe li respondus, ke oni finu la militon je ĉiu prezo, tio estas tute klara, ĉar neniu ŝatas esti bombata — kaj neniu volas sendi sian filon sur la batalkampon — li aldonis iom melankolie. EF

Itala samideano, akompanata de sia hungara gastiganto-neesperantisto, ne povis interkompreniĝi kun li. Sed jen jam surstrate aperas savanto kun la kongresa ensemblo sur la jako. Ĉio tuj klariĝis. La zorgojn forpelis la „facila vento”.

La unueca prononcado de nia lingvo nur malofte ebligas diveni la naciecon de la kongresanoj. Tial oni kutime demandadas: — El kiu lando vi venis? ...

Kun simila demando mi turnis min al la apude staranta kongresano. Eksciinte, ke ni ja estas samlandanoj, mi esprimis mian ĝojon nacilingve. Tuj la rideto malaperis de lia vizaĝo kaj li foriris. Mi ankoraŭ aŭdis por adiaŭo: — Mi tamen ne estas slovako! ...

Miaopinie li ne estis pacbatalanto!

Maljuna malsaneta virino sidas en la halo. Ŝia verda bluzo atestas, ke ŝi estas esperantistino. Ŝi silentas. El la pala vizaĝo rigardas senbrila okulparo. La tempo kurbigis ŝian dorson. Lacigas ŝin eĉ la spirado. Tamen ŝi partoprenas la kongreson, por ŝi eble la lastan.

Sed jen: la halon eniras gaja grupo da gejunuloj, vigle babilantaj. La maljunulino revigliĝas, kvazaŭ freŝa aero plenigus la halon. Ŝia vizaĝo akiras junecan freŝon. En la okuloj denove aperas fajro. Eĉ la dorson ŝi iom rektigis. Ŝi rejuniĝis! ...

Por ekskursoj diversdirektaj estis destinita unu tago de la kongresa semajno. Nia grupo, nombranta 600 kongresanojn, elektis la ŝipveturon laŭlonge de Danubo ĝis la urbo Estergom kaj reen. En belega vetero ni povis ĝui la panoramon de pitoreska pejzaĝo etendiĝanta sur ambaŭ bordoj de la riverego. Multaj ekskursantoj paradis en siaj naciaj kostumoj atestantaj pri la arta talento de la koncernaj popoloj. Per sia ekzotiko altiris ĉies atenton la japanoj, ĉefe la virinoj en belaj kimonoj. Deko da fotografiiloj klakadis ĉiam, kiam ili aperis sur la scenejo. Ili mem ankaŭ ofte fotografadis. Por pli bone vidi la riverbordojn el inter la ĉirkaŭstarantaj pli altaj eŭropanoj, la japanoj uzis seĝojn, stariĝante sur ilin. Sole ili metis paperon sub siajn piedojn. La ceteraj, uzante la seĝojn por la sama celo, ne zorgis pri ilia pureco. (Ankaŭ tiaj bagatelaĵoj karakterizas la homojn).

Sur la ŝipo ni vespermanĝis. Ĉar la kapacito de la manĝoĉambro ne ebligis samtempan manĝon por ĉiuj ekskursantoj, la altabliĝo okazis pogrupo. Atendante je sia vico sidis paro da gejunuloj. Mi aŭskultis por eble povi diveni ilian naciecon, sed ili nur malofte uzis lingvan parolon. Ili estis kaptitaj de eterna, tamen ĉiam mirinda — amo. Ili apartenis al du diversaj nacioj kaj interkonatiĝis dum la Kongreso, pere de Lingvo Internacia. Mi antaŭvidis feliĉan geedziĝon.

Jen, kial Esperanto vivos eterne!

Cibur

Bonŝanca monato.

La oktobro de la jaro 1906 estis bonŝanca monato por la apenaŭ naskiĝinta ĉeĥa Esperanto-movado. La unuan de tiu monato naskigis Jiří Kořínek, kaj tuj en la sekvanta tago Tomáš Pumpr. Do, hodiaŭ ili estas sesdekjaruloj, kaj rerigardante la fruktojn de sia vivlaboro, ili povus esti kontentaj. Tamen ili ne estas, ĉar kontento — tio estus fino de la artista vivo, kaj ili ambaŭ estas ankoraŭ plenaj de krea elano.

Jiří Kořínek estas konata en la tutmonda Esperanto-movado ĉefe pro siaj poemoj, originalaj kaj tradukitaj, troveblaj en ĉiuj gravaj Esperantaj revuoj kaj gazetoj, kaj precipe pro tiuj, kiuj al li jam plurfoje gajnis la ĉefajn premiojn en la Belartaj Konkursoj. Bedaŭrinde, multaj kuŝas ankoraŭ en lia tirkesto; certe mi ne troigas, se mi taksas la nombron de liaj poemoj, propraj kaj tradukitaj, je 400 ĝis 500. Libroforme aperis el lia plumo la ĉarma poemaro de Seifert „Panjo“, la NORDA PRISMO alportis la poemaron „Kronplekto de sonetoj“ de la sama aŭtoro. Prespreta estas la traduko de la poemaro „Bestetoj kaj homoj“ de K. V. Rais kaj multe da aliaj poemoj. Li tradukis ankaŭ la opertekston de „Jakobeno“ de Dvořák.

D-ro Tomáš Pumpr, membro de la Akademio de Esperanto, estas dotita per simila poeta sento, sen paroli pri almenaŭ same perfekta regado de la poeta ilo — la lingvo. Li alportis tradukojn de ĉeĥaj klasikuloj, el kiuj aperis libroforme la „Bukedo“ de K. J. Erben (Prago 1938) kaj „Bapto de caro Vladimir“ de K. Havlíček Borovský (Stafeto 1953). Liaj tradukoj tiom akurate sekvas samtempe la enhavon kaj la formon kaj muzikon de la originalo, ke al tiuj, kiuj konas la ĉeĥan tekston, ili povas servi kiel dokumento de la perfekta interpret-kapablo de Esperanto. Tiu kapablo montris sin ankaŭ ĉe traduko de kelkaj ĉeĥaj operoj, „En la putro“ de Blodek, „Vendita fianĉino“ de Smetana kaj „Najado“ (Rusalka) de Dvořák, kiujn post la milito disaŭdigis la radiostacioj Brno kaj Prago.

Kvankam Tomáš Pumpr vivas en Prago kaj Jiří Kořínek en Ústí nad Labem, do apartigas ilin distanco de 100 km, ili kuniĝis lastatempe super laboro tre respondeca kaj malfacila, nome traduko de la vivoverko de Petr Bezruč, poeto de la Ostrava-regiono. En tiu lando tiam, komence de nia jarcento, la popolo vivis sub kruela jugo sociala kaj nacia, minante por kelke da groŝoj karbon por germanaj minejposedantoj, kiuj per la sama karbo profitis milionojn. Nun la verko estas jam prespreta kaj ĝi estas aperonta en Ostrava venontjare.

Ni deziras al ambaŭ poetoj, ke ili ankoraŭ longe vivu en plena freŝeco de sia krea elano, kaj al ni legantoj, ke ni ĝisvivu la eldonon de ĉiuj iliaj verkoj, ankaŭ de tiuj, kiuj dume kuŝas en la tirkesto.

Fx.

Vizitu „Esperanto — kafejon” en Frýdek Místek ĈSSR

Ĉe la kruciĝo de la relvojo el Ostrava al la montaro Beskydy kaj de la internacia ŝoseo F7 situas la kreskanta urbo Frýdek Místek, kiu pasintan jaron festis sian 700-jaran jubileon kaj havas proksimume 30.000 loĝantojn. Granda parto de la loĝantaro laboras en la ŝpinejoj kaj teksejoj, al kies Uzina klubo apartenas nia Esperanto-rondeto. En la klubo vi trovos kiam ajn helpon de esperantistoj.

La kluba domo situas proksimume 50-100 m dekstre de horloĝa kolono, se vi veturas sur la ŝoseo E7 en la direkto al Pollando.

La duan dimanĉon en ĉiu monato okazas en la klubo „Esperanto-kafejo.” Je via dispono estas esperantlingvaj gazetoj, gramofon-diskoj kaj sonbendoj kun Esper. kantoj kaj dancmuziko, laŭokazaj programoj, filmoj k. a. Vi povos elekti la muzikon kaj kontribui per propraj programoj.

Dum la unua Esperanto-kafejo, la 14an de aŭgusto 1966 ĉeestis ankaŭ samideano Petro Poliŝĉuk el Taŝkento, kun filmoj pri Uzbekistano, packonferenco tie okazinta kaj pri la daŭranta tertremo.

Se vi intencas tranokti en Frýdek Místek, anoncu vin antaŭe, por ke ni povu mendi por vi liton en hotelo aŭ en la turisma noktejo.

Esperanto-rondeto
ĉe Uzina Klubo Slezan, Frýdek Místek.



SENDAS ESPERANTO-RONDETO EN PODĚBRADY
(MONDFAMA BANLOKO EN BOHEMIO)

Jana Cíhová:

ĈE AMIKOJ EN NEDERLANDO

En majo ĉi-jara mi vizitis Nederlandon por 10 tagoj je invito de geamikoj-esperantistoj Marjo kaj Peter van Bentum La flugo en „Iluŝin“ estas komforta kaj agrabla: tia rapida salto dum unu horo rekte de Praha ĝis Amsterdam. Antaŭ la alteriĝo mi ĝuis la unuan fortan impreson ekvidinte sube la maron, multajn kanalojn, pontojn kaj ŝipojn — vidaĵon por ni tiel nekutiman. La urbo Amsterdam mem estas tre interesa kaj la perŝipa rondveturo tra la kanaloj kun 700 pontoj kaj pontetoj, kun tipe nederlandstilaj domoŝildoj kaj fasadoj, la domo kie vivis Rembrandt, la florvendejo Singel, estis ravigaj.

La unuhora vojaĝo per vagonaro de Amsterdam ĝis Den Haag estas tre ĉarma. El la fenestro oni vidas tutajn areojn da kulturataj diverskoloraj tulpoj kaj ankaŭ la tipe nederlandajn ventmuelilojn — hodiaŭ jam nur historian meнораĵon de forpasinta tempo.

Unue mi havis la okazon vidi la kvartalon, kie loĝas la riĉuloj; belajn loĝejojn en domoj kaj vilaoj kun ĝardenoj — ĉio bonguste aranĝita, largaj fenestroj, tra kiuj videblas la tuta loĝejo, kvazaŭ la nederlandanoj volus komprenigi al la preterpasanto:

estu al ni bonvenanta, ĉi tie estas nenio kaŝebla, antaŭ vi ni ne havas sekretojn, eniru afable, restu kun ni. La enigardo en la loĝejon neniun ĝenas, sed neniuj ankaŭ scivole enigardas. Tio por ni estas ekkono tute nekutima kaj al mi persone tiu ĉi malfermiteco tre plaĉis, ĉar la nederlanda popolo estas vere bonkora kaj sincera. En la butikoj kaj vendejoj regas disciplino, la infano bonedukite demandas, ĉu jam venas ĝia vico, timante, ke ĝi okupos vian lokon.

Mi vidis ankaŭ la laboristan kvartalon, kie ne plu estas belegaj dometoj kaj ĝardenoj, sed tute ordinaraj kunpremitaj altaj domoj. Ekzistas plano por forigi tiun ĉi kvartalon kaj anstataŭi ĝin per tiaj domoj kun ĝardenoj, kiujn mi vidis en la kvartalo de la riĉuloj. Ankaŭ ekzistas plano pri ŝtatigo de malsanulejoj kaj urba transport-trafiko, kiuj estas parte privataj, parte urbaj.

La tagon, kiam en Nederlando estas honorigata la memoro de la ekzekutitaj viktimoj dum jaroj 1941-1945, mi partoprenis la funebran marŝon surloke de la ekzekutoj en Den Haag kaj la ceremonio, kiu estas tute spontana kaj senbrua, min tre forte impresis. Tiutage la 5-an de majo la loĝantaro amase kun la funebra muziko marŝiras al la koncerna loko kaj tie post ekludo de ŝtata himno kaj duminuta silento unuope oni metas florbukedojn. La mia, plektita el blankaj diantoj, ĉirkaŭvolvita per nederlanda kaj kompletigita per ĉeĥoslovaka flagetoj ricevis honoran lokon, tuj, kiam mi proksimiĝis kaj kiam oni ekvidis la flageton.

En Den Haag mi ricevis du agrablajn vizitojn. Unu de s-ano Herman Haijemaĵe, iam vizitinta Pragon, kaj nun korespondanto kaj aŭskultanto de Esperanto-elsendo de Radio Praha. Duan de s-ro van der Horst, fervora kunlaboranto de nia Esperanto-elsendo kaj funkciulo de SAT-organizaĵo.

10 tagojn mi pasigis en Nederlando, sed mi akiris multajn agrablajn impresojn, mi konatiĝis kun novaj geamikoj, kun kiuj mi ligis daŭran korespondan kontakton, mi ekinteresiĝis denove pri Praha kaj Ĉeĥoslovakio kaj ankaŭ pri la Lingvo Internacia, pro kio mi tre ĝojas, se mia vojaĝo kvankam privata ne estis vana. Per tiu ĉi vojo mi volas danki al miaj geamikoj van Bentum, kiuj eblegis al mi vojaĝi en ilian belegan kaj interesan landon kaj mi esperas denove baldaŭ renkonti ilin en Ĉeĥoslovakio, kien ili diligente vojaĝas preskaŭ ĉiujare kaj vizitis ĝin jam sepfoje. En sia loĝejo ili kun granda amo kolektas diversajn objektojn el Ĉeĥoslovakio kaj sur vando de ilia loĝejo daŭre pendas la landkarto pri nia lando. Karaj geamikoj, ĝis revido!

Letero de Zamenhof trovita en Prago


En la arkivo de la Nacia Muzeo en Prago estis trovita kondolenca letero de Zamenhof, adresita al la tiam Esperanto-societo „Verda Stelo”. La leterpapero estas jam flaveta kaj iom difektita.

La letero tektas jene:

„D-ro L. L. Zamenhof, Varsovio, str. Dzika N-ro 9. 15. IX. 1911.

Al la Societo „Verda Stelo” en Prago. Kun granda malĝojo mi legis Vian sciigon pri la morto de Via Prezidanto, nia meritplena kunlaboranto Dro Siegfried Lederer. Al la Societo mi esprimas mian sinceran kondolencon. Mi petas, volu ankaŭ transdoni mian koran kondolencon al la familio de la formortinto. Via Zamenhof”

foto Ant. Blaha



Členem Světového míroieho esperantského hnutí

(Mondpaca Esperantista Movado) jehož čs. sekce rozvíjí svoju činnost v rámci ČSEV, se může stát každý pokrokový esperantista.

V členství Kčs 20.— ročne je zahrnuto předplatné na mezinárodní časopis PACO.

Přihlášky přijímá: Administrace časopisu pro Československo, — Z. K. — ROH ŠKODA, kroužek esperantistů, Kopeckého sady 13, PLZEŇ.

Raporto pri la agado de la Sociale sanitara Sekcio de la Universala Medicina Esperanto-Asocio por la kunveno okaze la 51-a Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝto.

La aktiveco de la Sociale sanitara Sekcio de la UMEA en la pasinta periodo estis malfavore influita parte per malfavora sanstato de ĝia komisiita gvidanto, parte per maifacilaĵoj en kontaktoj inter unuopaj kunlaborantoj. Sekve de tio la agado de la Sekcio estis limigita al senpera kontakto de la komisiita gvidanto kun okazaj kunlaborantoj kaj interesuloj.

Preterlasante la demandojn pure organizajn, ekz. pri ebleco fariĝi membro de UMEA, aboni la Medicinan Internacian Revuon, interŝanĝi gazetojn kaj sim., temis ĝenerale pri interŝanĝo de opinioj:

1. pri vivnivelo kaj vivcirkonstancoj kiel bazo de la sana vivmaniero, precipe rilate al invalidoj kaj ilia prizorgado aŭ per zorgo produktiva (interhelpaj kaj kooperativaj entreprenoj, ebleco perlabori dum konvenaj laborkondiĉoj) aŭ per zorgo subtena

2. pri konvena vivmedio de homoj sanece difektitaj, kaj pri higienaj vivkondiĉoj, liberigitaj de malutilaj influoj de venenigaj produktoj de industrio k. sim., de bruoj k. t. p.

3. pri specialaj aranĝoj prefere al invalidoj sekve de socie danĝeraj malsanoj, precipe ftizo

4. pri ebla danĝero de sekvoj de la t. m. „populacia eksplodo“ kaj aranĝoj kontraŭ ĝi, nome pri la kontraŭkonceptio.

5. pri problemoj gerosociaj, precipe rilate al la prizorgado en domoj de pensiuloj, en kadukulejoj kaj ceteraj institutoj por gemaljunuloj soligitaj

6. pri eŭtanazio je propra postulo de la malsanulo, suferanta per nekuracebla kaj doloriga malsano.

La pritraktado de la aluditaj aferoj ankoraŭ ne amasigis tiom da materialo, por ke estus konvena fari, ekz. eĉ publikigi ian resumon: tio do apartenas al la estonteco kaj dependas de la aktiveco de pluaj interesuloj, kiuj per ĉi tia raporto estas petataj, sciigi ilian opinion pri tiaj el la menciitaj problemoj, kiaj interesas ilin.

Nesufiĉa estis la kontakto de la komisiita gvidanto de la Sekcio kun la Centraj organoj de la U. M. E. A.; la kaŭzo de tio estas, ke la pritrakitaj problemoj ne atingis staton tiel gravan, ke estus senkulpigebla ĝeni per ili la eminentajn funkciulojn. Temis ja pri simplaj demandoj, por kies respondo sufiĉe da materialo estas atingebla por la komisiita gvidanto, kaj la agendo kun ĝiaj elspezoj ne superis liajn eblecojn.

En ĉi tia agado la komisiita gvidanto de la Sekcio eluzadis eĉ siajn disponojn kiel vicprezidanto de la Ligo de Ĉeĥoslovakaj invalidoj kaj ĉefo de ĝia Sekcio por interne malsanai: nome li ĉeestis kelkajn kongresojn kun internacia partoprenantaro ekz. la TV-a Mondkonpreso pri vivkondiĉoj kaj sano en Karlovy Vary la 2.-5. IX. 1965, Nacia Kongreso de la Germana Asocio por Rehabilito en Veimar (GDR) la 29—31. III. 1966, III-a Psikiatria Kongreso en Brno (ĈSSR) la 27.-29. VI. 1966, k. sim. La informoj tiamaniere akiritaj estas eluzataj eĉ en la plua agado de la Sekcio.

Por la venonta periodo opinias la Komisiita gvidanto de la Sociale sanitara Sekcio de la U. M. E. A. kiel rekomendinda la sekvantan laborplanon:

1. Firmigi la organizan reton de kunlaborantoj de la Sekcio; publikigi raporton pri ĝisnuna agado kaj laborplanon de la Sekcio kun invito de interesuloj, partopreni la pritraktadon de la problemoj menciitajn sub 1.-6.

2. Helpe de esperantistoj — funkciuloj de la organizaĵoj, kiuj valorigas sin en unuopaj landoj per solvado de problemoj sociale sanitara kaj per ekzistencaj kaj sociaj problemoj de sane difektitaj homoj, interligi la kunlaboron kun ĉi-tiaj organizaĵoj cele de interŝanĝado de spertoj,

3. Klopodi pri publikigo de akiritaj opinioj kaj spertoj el la agado de la Sekcio cele de uzado de konformaj informoj en la praktika vivo kaj laboro,

4. Proponi kunlaboron al la Universala Kontraŭ-alkohola Esperanto-societo eĉ al ceteraj Esperanto-societoj, kies tendencoj iamaniere koncincidas kun la laboro sociale sanitara.

La Komisiita gvidanto de la Sekcio estas preta disponigi al la interesuloj ĉiujn spertojn el la sociale sanitara zorgo en ĈSSR, kaj en la Ligo de ĉeĥoslovakaj invalidoj — Sekcio por interne malsanaj, pritrakti reciprokajn vizitojn de funkciuloj de la organizaĵoj, kiuj okupiĝas per zorgo pri sanece difektitaj homoj per internaj malsanoj, (ftizo k. sim.) Krom tio li provizos senpagan sendadon de la Esperantista gazeto por blinduloj „AŬRORO" (presita per literoj laŭ Braille), kies redaktadon li partoprenadas, al ĉiu blindulo, kies adreso estos al li sendota de kiu ajn membro de la U. M. E. A. (aŭ la Delegito de UEA).

La ĝisnuna agado de la Sociale sanitara Sekcio de la U. M. E. A. ne pretendas esti opiniata kiel perfekta, sed estas eble pliperfektigi ĝin per plialtigita intereso kaj kunlaboro de ĉiuj, kiuj volus kaj scipovus eluzi la servojn de la Sekcio. Certan plibonigon oni povus atendi ankaŭ, se estus forigitaj la malfacilaĵoj, kiuj malhelpas ĝis nun atingi la regulan membrecon de la U. M. E. A. al la interesuloj el la landoj, el kiuj ĝis nun ne estas eble pagi membrokotizojn kaj aboni la Medicinan Internacian Revuon.

Jos. Ed. Ambrož

60. jubilejní kongres Švédské esperantské federace

V posledních dnech května 1966 konal se v Skövde (Švédsko) jubilejní kongres SEF. Zároveň s ním se uskutečnilo setkání mladých švédských esperantistů. Byl to tedy dvojnásobný kongres. Jednání byla prokládána několika kulturními akcemi, např. návštěvou koncertu orchestru B. Rodricka a dvěma výlety do okolí. Oficiální reprezentací SM ČSEV byl pověřen E. Moravec. O svých dojmech z návštěvy Švédska hovořil na pravidelné schůzce pražských členů výboru Sekce dne 10. 6. 1966.

Karolo Píĉ

LINGVA ANGULO

KANTO PRI -UJO

(Al K. Kalocsay kaj G. Waringhien)

Sendube unu el la plej elstaraj
kaj krome ankaŭ la plej aktualaj
sufiksoj esperantaj estas nepre
la landsufikso -uj. Mi certe ne tre
eraros, se mi tuj deklaras brave,
ke ofte oni traktas ĝin malprave,
iom kaprice, fuŝe kaj maljuste,
pli-malpli nelogike kaj malĝuste.

Al tiu ĉi sufikso, ĝenerale,
unuoj kondukas preskaŭ kanibale,
dum la aliaj en la sama horo
defendas ĝin kun viglo kaj fervoro.
Kaj tiel daŭras la legenda lukto
pro -io, -uj' (ĝi dormu pace! punkto!).
Kaj multaj homoj kaptas ĉiun ŝancon,
por en la serv' de ujo rompi lancon,

Unue: **Ujo** estas, antaŭ ĉio,
vazo por ĉiuspeca materio,
skatolo, kruĉo, kesto aŭ botelo,
do io kiel poto aŭ barelo.
Ekzemple: benzinujo, sukerujo;
krome: pipruj', fajrujo, paperujo;
akvujoj: ŝtonaj parkaj basenetoj;
alumetuj': skatol' por alumetoj;
salujo: porcelana vaz' por salo;
galujo: korpa veziket' kun galo;
inkuj': botelo inka (aŭ flakono!);
monujo: uj' en kiu estas mono
(iam ne estas! ofte eĉ nur groŝo
mankas en la monuj' kaj en la poŝo).

Nu, due, **ujo** estas, speciale,
kava objekt' en kiu ja normale
kaj laŭregule oni faras ion:
kuŝujo (pri ĝi vidu la Biblion!);
lavujo: larĝa, malprofunda pelvo,

en kiu oni lavas sin kun vervo;
knedujo: en ĝi paston oni faras
kaj ĉiutagan panon knedpreparas;
dum en pistuj' pistiĝas salo, karbo ...

La tria **uj'**-signifo estas: arbo.
Sur ĉerizujo ĉerizfruktoj kreskas;
sur prunujo prunoj pitoreskas.
Pomuj' aŭtune dolĉajn pomojn donas;
kaj sur pirujo piroj sin proponas;
bananoj de sur bananujo pendas;
kaj rozoj sur rozuj' aromon sendas.
Ribujo estas eta riboarbo;
sed hom', sur kiu kreskas densa barbo,
tute ne estas, ho! kaj ve! barbujo!
Kontraŭe konifero nome tujo
ne apartenas al la ujo-bando.

La kvara **uj'**-signifo estas: lando.
Tamen en tiu ĉi kategorio
anstataŭ -uj' funkcias ofte **-io**
(sed ĉar ĝi estas neoficiala,
evitu ĝin, se estas vi lojala!).
Do tial en gazetaj artikoloj
duope svarmas regiontitoloj:
Anglujo, Dalmatio, Germanujo,
Ĉinujo, Norvegio, Albanujo,
Svedujo, Afganuj', Abisenio,
Britujo, Bulgarujo, Armenio.
Nu, tiuj ĉi ekzemploj, celkonforme,
laŭ mia kred' sufiĉas porinforme.

Kaj, kvine, nia **uj'** signifas, vere:
teritori' kuŝanta ĉerivere
(ĉi tie, miru pri la sensacio!
anstataŭ -ujo ne funkcias **-io**,
ĉar tie ĉi ja **uj'** ne estas lando,
sed nur terstrio, io kvazaŭ strando):
Nilujo: proksimume tiu zono,
kiun la Nil' akvumas dum sezono;
Rejnujo: longa, larĝa, riĉa strio,
kie troviĝas multa industrio;
kaj Eŭfratujo: stranga ter' barbara,
kie ja estis la lulil!' homara;
simile Danubuj', Amazonujo,

Elbujo, Vistulujo, kaj Ronujo,
Orinokuj', Odrujo, Tigrisujo,
Dneprujo, Tiberujo, Tamizujo,
Donujo, kaj la ĉeĥa Vultavujo,
la hinda Gangesujo; Sazavujo.

Kaj la alia; jam la sesa, senco
de **uj'** nun sekvas kun la konsekvenco:
ĝi estas: administra regiono,
distrikt', departemento aŭ kantono:
episkopujon episkopo regas;
kaj bona reĝ' reĝujon juste flegas;
kalifo super kalifujo pompas;
kaj grafo pro grafujo spadon rompas;
princo princujon saĝe administras;
dukinon ŝia dukinujo distras;
hetmano nur en hetmanujo ĉefas;
sultanon sultanuj' obei devas.
Tamen, se mankas al vi lingva sperto,
ĉi tie iom haltu por averto!
Memoru: **uj'** ne estas **ejo!** Klare?
Se vi deziras skribi senerare,
ĉiam vin helpu per ĉi tiu tezo:
episkopujo estas diecezo!
Tiam facile kaj eĉ sen medito,
tuj vi divenos (dank' al via sprito),
kaj parte ankaŭ dank' al Dia graco):
episkopejo estas ja palaco;
kaj prefektujo estas regiono,
sed prefektejo nur — prefektodomo! —

La sepa **ujo**-senco, paŝ' post paŝo
jam prezentiĝas: urboĉirkaŭaĵo —
Bernujo, Madridujo, Ĉikagujo,
Oslujo, Uzikuj', Kopenhagujo,
Pragujo, Berlinujo, Lisbonujo,
Lurdujo, Ĝenevujo, Londonujo;
kaj ĉiam tiel plu laŭalfabete,
severe gramatika kaj dekrete.
Sed Parizuj' ne estas ja Francio
(se mi memoras, siatempe io
tia estis eĉ foje proponata,
tamen ne iĝis iom pli konata!):
En Parizujo furiozis vento
signifas: en la urbdepartamento;

nur tie ĝi sub virinjupojn glitis,
tamen Francion tute ĵi evitis.

Simile ankaŭ montarregiono
per ujo esprimiĝas laŭ bezono.
Ni citu Karpatujon do ekzemple,
Tatrujon aŭ Pireneujon eble.
Kelta Gaŭluj' en Transalpujo parte
situis (kiel lernis vi aparte!),
krome en Cisalpujo roma kuŝis
(homoj sin tie ĉiam interpuŝis).

Marregiono estas la alia
uj-senco strikte nur geografia.
Do: la Skandinavuja solidaro;
simile: la Pacifikuja varo;
aŭ: la Mediteraneujaj gentoj;
krome: la Egeujaj kulturcentroj.

Sed ujo estas eĉ teritorio
ĉirkaŭe aŭ laŭlonge de linio:
inter tropikoj tropikujo kuŝas;
la landlimujo landlimujon tuŝas;
super ekvatorujo brilas suno;
en polusujo estas nur mallumo.

La antaŭlasta **ujo**-senco estas:
loko en kiu homa grupo nestas:
patrujo estas la plej ordinara
ekzemplo de ĉi tiu uz' normala;
kanibalujoj preskaŭ ne ekzistas:
nu, banditujoj ie plu rezistas;
sed piratujoj nur en libroj rolas
(ĉar nun la Ŝtato ĉion jam kontrolas:
ĝi havas forton kaj aplikas ruzon).

Sed -uj' eĉ konas la liberan uzon:
sonĝujo estas tiu rava lando,
kiu situas trans la sonĝa vando;
kaj sovaĝujo estas malproksimo,
pri kiu revas ĉiu viranimo.

Resume la difino estas tia:
ujo (en la signif' geografia)
sencas: PLI-MALPLI GRANDA SPACO TERA,

EN KIU NESTAS (laŭ logiko fera):
nacio urb', river' reganto, maro,
ul, linio, io-a, montaro.

Dek du signifojn havas la Sufikso
(ĝi vivu do, simiie al Fenikso!).
Kaj vi ĝin ŝatu kaj estimu juste;
kaj ĉefe, uzu ĝin, kaj uzu ĝuste!

SPECIALA METILERNEJO EN SADSKÁ, ĈEĤOSLOVAKUJO

En ĉi tiu metilernejo estas instruataj mensmalfortaj junuloj 15— 18-jaraj. Ili povas fariĝi masonistoj, ĉambropentristoj, pentristoj-ŝmiristoj, terkulturistoj. Dum la terkulturistoj lernas dum 2 jaroj, la ceteraj dum 3 jaroj.

La junuloj laboras praktice dum 26 lecionoj kaj lernas teorie dum 18 lecionoj. La teoria instruado okazas en instruejoj, la praktika en ekzercaj praktikejoj, sed pli poste rekte en la praktiko. Ekz. la ĉambropentristoj pentras la vandojn de la loĝejoj en Sadská kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, la terkulturistoj laboras sur la kampoj kaj herbejoj de la komunuma terkulturista bieno, la masonistoj estas mendataj por diversaj riparadoj kaj konstruadoj.

Ĉiuj lernantoj loĝas en la internulejo de la lernejo. La edukistoj zorgas pri ili post la teoria kaj praktika instruadoj, organizante diversajn interes-rondetojn, ebligante legadon, studadon; estas projekciataj filmoj; oni rigardas televid- aŭ aŭskultas radio-programon. Krome okazas liberaj promenoj kaj sabataj revenoj al la gepatroj, se la hejmo ne estas tro malproksime.

Fininte la lastan klason ili faras ekzamenon, kiu konsistas el partoj skriba, praktika kaj buŝa. Post sukcesa ekzameno ili ricevas atestojn pri ellerno kaj fariĝas kvalifikitaj laboristoj. Ili estas dungataj de entreprenoj, ĉe kiuj ili jam laboris praktike dum lerneja ferio (julio-aŭgusto).

Por tiuj, kiuj ne povas esti tuj envicigitaj en fakajn klasojn, ekzistas prepara klaso, kie ili lernas labori kaj konatiĝas kun ĉiuj metioj, por ke la instruistoj ekkonu, por kiu metio ili taŭgas.

Ĉar nia metilernejo estas nova (ĝi funkcias ekde 1958), ni kolektas spertajn pri la edukado kaj instruado de mensmalfortaj infanoj. Bonvolu skribi al ni petante informojn kaj konsili, kion ni faru, kio estas plibonigenda kaj enkondukenda. Ni volonte akceptas intersanĝadon de spertoj. Skribu al:

Josef Chvosta,
Engelsova 289, II, 22.
PODĚBRADY, okres Nymburk

Recenzoj

Sergej Jesenin: VERSOJ ELEKTITAJ, eld. Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetaj esperantistoj, Moskvo 1965. Redaktis: K. Gusev kaj I. Ĥoves, il. V. Cvetkova, pĝ. 60

Post enkondukaj vortoj de N. Tichonov oni legu pri la sorto de ĉi tiu granda lirikisto, kies voĉo tiom frue silentiĝis.

Plejparto de la tradukoj estas laboro de H. Drezen kaj S. Rublov.

POR LA PACO, eld. Unio de sovetaj societoj de amikeco kaj kulturaj ligoj kun eksteraj landoj kaj Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetaj esperantistoj, Moskvo 1966, pĝ. 64.

Kolekto de diversaĵoj kompilita el gazetartikoloj de sovetaj esperantistoj, kaj de kelkaj beletraj tradukoj.

OKN

VÝZNAMNÁ UDÁLOST V ŽIVOTĚ ESPERANTSKÉHO HNUTÍ

Zástupce československého esperantského hnutí členem Československého
výboru obránců míru

Ve dnech 31. října a 1. listopadu 1966 se konala v Praze celostátní konference Československého výboru obránců míru.

Československým esperantistům a jejich práci na mírovém poli se zde dostalo vysokého uznání tím, že do nového ústředního orgánu ČSVOM byl zvolen tajemník ČSEV a vedoucí československé sekce MEM Tomáš Balda.

Českoslovenští esperantisté, sdružení ve Světovém mírovém esperantském hnutí (československá sekce MEM) rozvíjejí na úseku konkrétní mírové práce velké a cílevědomé úsilí. Kromě aktivní účasti na vydávání mezinárodního časopisu PACO, účinně spolupracují s ostatními zemskými sekcemi, výbory, a jednotlivými aktivisty MEM ve více jak 40 zemích. Nekompromisně hájí myšlenku míru, uskutečňují mezinárodní solidaritu se všemi pokrokovými a mírumilovnými silami ve světě; všemožně podporují bratrský vietnamský lid v jeho boji za svobodu a nezávislost — proti nespravedlivé útočné agresi USA. Českoslovenští esperantisté tím přispívají k důslednému uskutečňování ušlechtilé, lidské myšlenky, která zde byla již při zrodu esperanta: k míru, přátelství a spolupráci mezi národy — proti válce a jakémukoli bezpráví.

Členství zástupce esperantistického hnutí v Československém výboru obránců míru není tedy jen nahodilou skutečností, ale logickým zdůrazněním a uplatněním cílů a postání esperanta již od jeho vzniku.

Tomba

LITERÁRNÍ SOUTĚŽ

Esperantský kroužek ZK Ostroj v Opavě vyhlašuje v rámci Esperantského kulturního festivalu „Opava 1967“

Literární soutěž v oboru poezie původní a přeložené

Podmínky soutěže:

1. Soutěž je anonymní a může se ji účastnit každý esperantista.
2. Každý soutěžící může zaslat libovolný počet básní původních či přeložených a to jen takové, které nebyly dosud nikde postoupeny.
3. Uzávěrka soutěže je neodvolatelně

30. dubna 1967.

Soutěžní práce je třeba zaslat ve trojím vyhotovení; každá práce musí být označena heslem. Ve zvláštní zalepené obálce, která musí být označena stejným heslem, musí být uveden autor s plnou adresou. Příspěvky nutno zasílat na adresu:

Ing. V. **Kočvara**, Leninova 84, Opava.

4. Všechny příspěvky, které dojdou do uzávěrky a v úpravě dle bodu 3., posoudí odborná tříčlenná komise. Členové poroty se soutěže nemohou zúčastnit.
5. Na návrh poroty udělí vyhlašovatel tyto premie:
 1. cena Kčs 300.—
 2. cena Kčs 200.—
 3. cena Kčs 100.—

Je možno však některou z cen neudělit nebo je sloučit a také počet cen zvýšit..

6. Ceny budou uděleny při závěru esp. kulturního festivalu "Opava 1967" dne 9. 7. 1967 na zámku Hradec u Opavy.

Esperantský kroužek ZK Ostroj chce touto soutěží dát příležitost všem novým talentům, aby vyzkoušeli své síly. Věříme, že naše soutěž nalezne pochopení mezi esperantisty.

Kroužek esperanta ZK Ostroj
Opava

UNESTENO.

La budapeŝtaj kongresanoj ricevis inter diversaj Esperantopublikaĵoj ankaŭ prospekton pri „Unesteno“ — Universala Esperanta Stenografio. La unupaĝa provteksto en la prospekto sufiĉas por bone prezenti la fundamentojn de tiu ĉi verko.

Jen temas pri nova aranĝo de la sistemo Stolze-Schrey, kiu estas vaste aplikata en Svislando por ĉiuj tieaj kvar lingvoj, kaj ankaŭ por lingvoj aliaj.

Ĉar Unesteno, laŭ sia nomo, pretendas universalecon, oni devas demandi, per kio ĝi volas atingi tion, kion eĉ nun ne atingis iu el la diversaj mondfamaj stenosistemoj, alfaritaj por Esp-o (ekz. Pitman, Gregg, Duployé, Gabelsberger aŭ iu alia)? Kion novan do alportas la Unesteno, kiel ĝi povas superi la aliajn famajn

stenosistemojn? Respondo al tiu demando estas surpriza, ĉar negativa: Nenion!

La aŭtoroj (s-roj J. J. Sturzenegger kaj H. Matzinger) aplikas dikajn strekojn, por simboligi la vokalon „a” sur la *sekvanta* konsonanta signo (prenita precize el la sistemo Gabelsberger el la j. 1834). Ili ne konsideras, ke nuntempe la plej vaste uzata skribilo estas la globetplumo, per kiu oni tamen ne povas diferencigi la strekojn dikajn kaj maldikajn, kaj tial por skribi Unestenon oni bezonas alian skribilon ol tiun, kiun hodiaŭ preskaŭ ĉiu homo ĉiam havas en sia poŝo.

Tiu ĉi adapto ankaŭ pensigas min pri alia interesa fakto: En 1920 ĉeĥoj d-ro Alois Herout kaj inĝ. Svojmír Mikulík kreis kursivan sistemon, nepre science prilaboritan, en kiu ĉiuj eblecoj de skribo estas ekspluatitaj je maksimuma grado. Tiel estas eble, legi la diversajn alilingvajn sistemojn kursivajn, donante al la signoj la signifon de la sistemo Herout-Mikulík. Jen oni ricevas grupojn da sonoj, kiuj laŭ sia nombro superas tiun, kiun esprimas la signoj de la pritaksata stenografio.

Jen komparo de kelkaj Unestenaj vortoj laŭ ilia efektiva signifo kun songrupoj, kiujn ili havus, legataj laŭ sistemo Herout-Mikulík:

Unesteno: feto
 detempe
 paketo
 lago

Herout-Mikulík:hrovro vevromebre
 bretrouvro aŭ
 bretraotvro
 hetao

Do per la samaj signoj, kiuj en Unesteno esprimas 4, 7, 6, 4 literojn, oni povas en sistemo Herout-Mikulík skribi 6, 10, 10 (aŭ 11), 5 literojn. Tio pruvas, ke Herout kaj Mikulík jam antaŭ 46 jaroj pli utile ekspluatitis la grafikan materialon por la stenografia celo, ol faras la nuntempaj aŭtoroj.

Fine ankoraŭ estas menciinde, ke la aŭtoroj sur unusola varbiga paĝo uzas vortojn, kiuj estas troveblaj nek en PV, nek en la Suplemento: streta, pampelmo. Tiaj vortoj ne devus esti uzataj ĉe eksplikado de lernaĵo.

Konklude: Por ke la stenografio estu vere universala, ne sufiĉas nomi ĝin tia.

Adolf Staňura.

INTERNACIA GEOLOGIA KONGRESO

Okazos en Prago ekde la 19-a ĝis la 28-a de aŭgusto 1968. Ĝiaj oficialaj lingvoj estos la angla, franca, germana, itala, rusa kaj hispana, sed oni intencas preferi la anglan, en kiu la organiza komitato korespondas kaj en kiu ĝi publikigos la kongresajn traktaĵojn. Ĉiuj rekomendoj por ŝanĝi la statuton de la kongreso estas prezentendaj antaŭ la unua de novembro 1967. Tial Geologia Sekcio de ISAE, kunlabore kun Instituto por Oficialigo de Esperanto, kolektas subskribojn de la tutmondaj geologoj por peti enkondukon de Esperanto ĉe IGK en 1968.

Ankaŭ la ĉeĥoslovakaj ISAE-aktivuloj, sendepende de tio, en kiu fako ili laboras, povas efike helpi dum la kolektado de subskriboj de geologoj en nia lando.

Ili esploru en sia urbo aŭ ĉirkaŭaĵo, ĉu troviĝas iu geologo kaj petu lian subskribon. Subskribfoliojn vi ricevos de la landa delegito por Ĉeĥoslovakio (J. Kavka, Praha 6, Lužná 7), kiu jam kolektis multajn subskribojn de diverslandaj geologoj-eminentuloj. La intervenon ĉe la organiza komitato de IGK 1968 partoprenos la fakulo pri internaciaj kongresoj, s-ano G. C. Fighiera, ĝenerala sekretario de Vojaĝ-agentoj en Bruselo, vicdirektoro de IOE.

Helpu ĉiuj! La venko en geologio akcelos la venkon ankaŭ en via fako!

INSTITUTO POR OFICIALIGO DE ESPERANTO

okazigis inter la 25-a kaj 29-a de julio 1966 sian unuan laborkonferencon sub la devizo „Pli valora la praktiko ol centhora prediko”. La traktado estis vere interesa kaj pruvis, ke IOE jam serioze ekpaŝis por enkonduki Esperanton en multajn branĉojn de la homa vivo. Por la sciencistoj precipe gravas la decido de IOE, en kunlaboro kun ISAE entrepreni varbadon inter astronomoj, geologoj kaj ĥemiistoj.

La pragan konferencon partoprenis jenaj ges-anoj el Ĉeĥoslovakio: Jana Cíhová, Ark. Jos. Drn, D-ro Václav Faigl, Jozef Fekete, Jan Kafka, Josef Kavka, Karel Kraft, D-ro Václav Svátek, D-ro Vlastislav Zázvorka. La laborkunsidojn rezidis laŭvice la ĉeestantaj direkciaj de IOE: Lic. Tibor Sekelj, Antonije Sekelj, Ing. Jean Dettwiler, Miloslava Kolinská, Johan Vilho Kostioinen, D-ro Václav Faigl kaj Gian Carlo Fighiera.

IOE kunvenis ankaŭ en Budapeŝto dum la 51-a UKE kun partopreno de 120 kunlaborantoj kaj amikoj de IOE. La diskutado estis vigla kaj fruktodona.

En septembro aperis la 3-a n-ro de la IOE gazeto. La ĉeĥoslovakaj ISAE-aktivuloj povas ĝin aboni ĉe Poštovní služba, dovoz tisku, Praha 6, Vinohrady, Vinohradská 46. Ĝi aperigadas tre interesajn sciigojn pri aplikado de Esperanto en diversaj fakoj.

ĈO VÁS BUDE ZAUJÍMAT

zo 4. plenárneho zasadnutia ČSEV 10. 12. 1966 v Prahe?

Zúčastnili sa členovia ČSEV ss.: Sviták, Čambál, Balda, Lehotský, Kočvara, Dr. Šikula, Kucín, Hršel. Prizvaní: Bořánek, administrátor PACO a OP; Ing. Felix, člen red. rady pre Zprávy ČSEV; O. Kníchal a J. Vítek — redaktori rubriky OP, Dr. Ľ. Izák, red. Zpráv ČSEV.

Tajomník s. Balda predniesol zprávu o činnosti ČSEV, sekcií, komisií a krúžkov; kontrola splnenia úloh od 3. plen. zasadnutia v Ostrava bolu priaznivá.

„**Zprávy z esperantského sveta**” žiada naša esperantská verejnosť a preto plénum poverilo s. Hršela vedením tejto rubriky v „Zprávach ČSEV”. Jeho úlohou bude zhromažďovať zaujímavosti zo svetovej esp. tlače a pravidelne ich posielat’ redaktorovi Zpráv ČSEV. Súdr. Hršel sa zároveň stáva i členom redakcie.

Vo veci podpisovej akcie UEA ČSEV sa obráti na MŠK i MZ so žiadosťou, aby zástupca ČSSR podporoval návrh na riešenie jazykového problému, ktorý zástupci UEA odovzdali predstaviteľom sekretariátu OSN v októbri 1966.

Plénium ČSEV s aktívom slov. esperantistov bude v jeseni 1967 v Bratislave. Ss. Čambál, Lehotský a Izák dostali poverenie vec dohodnúť a skoordinať so stretnutím esp.-istov v Dudinciach.

Uznanie a poďakovanie vyslovilo plénium usporiadateľom aktívu Severomoravského kraja 29-30. 10. 1966 za veľmi úspešnú prácu.

Mená svojich náhradníkov oznámili plénu členovia ČSEV, aby v prípade ich neprítomnosti sa zaistila ich úplná informovanosť a nerušená spolupráca v uskutočňovaní uznesení plen. zasadnutí.

Kto bude vydávať esp. pohľadnice? ČSEV prenecháva iniciatívu väčším krúžkom a žiada, aby podľa svojich možností samy vydávali pohľadnice. Pripomína im však, aby dbali na jazykovú úpravu nielen pohľadníc, ale aj iných publikácií (prospekty a p.). ČSEV ponúka im pomoc svojej jazykovej komisie pri kontrole textov.

Vydanie Berkovej učebnice plénium vzalo na vedomie, žiaľ, nie je bez chýb.

Esperantská rubrika v OP, v r. 1967 Nedeli bude ďalej vychádzať. Terajší náklad časop. je 16 700 ex. a do konca 1967 má dosiahnuť 25 tisíc. Od r. 1968 má vychádzať týždenne na 20-28 stranách. (Plénium vzalo na vedomie referát s. Knoblocha a poverilo spolu so ss. Kníchalom a Vítkom, aby pripravili návrh na kurz esperanta v OP, ktorý predloží na schválenie predsedníctvu ČSEV.)

Zoznam krúžkov. Počíta sa s tým, že v esp. rubrike Nedele bude uverejnený zoznam krúžkov, aby záujemci o ďalšie služby sa mohli obrátiť na najbližší krúžok vo svojom okolí.

Z ďalších bodov uvádzame len heslovite: prejednanie a schválenie **pracovného plánu a rozpočtu ČSEV na rok 1967**, ťažkosti s vychádzaním Zpráv, výsledok ankety o Zprávach, zpráva administrátora PACO atp., čo všetko svedčí o rozsiahlej a serióznej práci ČSEV. iz.



Bonvenigo de Prof. Vesna Skaljer-Race antaŭ la stacidomo en Vsetín, okaze de ŝia prelegvojaĝo en ĈSSR. (Ges-anoj Vysloužilová, Berka, D-rino Poláčková, Skaljer-Race el Beogrado, Sousedíková).

Prelegvojaĝo de jugoslava esperantistino

Je invito de ĈSEK prelegis Vesna Skaljer-Race por neesperantista publiko en 16 urboj de ĈSSR (Písek, Tábor, Kolín, Hradec Králové, Pardubice, Svitavy, Olomouc, Hranice, Ostrava, Opava, Třinec, Místek, Frýdlant, Vsetín, Brno kaj Třebíč). Entute 1726 personoj aŭskultis ŝin kun granda intereso. Ĉie funkciis perfektaj tradukantoj, kio elmontris la praktikecon de Esperanto kiel pontlingvo. Fine ŝi estis intervjuita ankaŭ en Ĉs. Radio, studio Brno.

Post la prelegvojaĝo de la jugoslava profesorino V. Skaljer-Race en ĈSSR, je temo „Nuntempa Jugoslavio“, ges-anoj Cíhová kaj red. Kníchal vizitis la jugoslavan kulturataŝeon k-don Radinovič por lin koncize informi pri la situacio en nia Esperanto-movado kaj pri la interkontaktoj inter Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato kaj Jugoslava Esperanto-Ligo. K-do P. Radinovič promesis kunlaboron, moralan kaj finanĉan helpon ĉe okazigo de similaj prelegvojaĝoj en la estonteco, laŭ la eblecoj de la ambasado.

Lístkový adresář

Klub, který chce své členy, kursisty a zájemce informovat oběžníkem a zasílat jim pozvánky apod., musí o nich mít stálý přehled. V hradeckém klubu se nám osvědčil lístkový adresář. Používáme listků formátu A6 (105 X 148 mm) anebo obálek, do kterých se dá vložit předem napsaná adreska k přilepení. Průklepem dostaneme kopii pro abecední seznam. Originál řadíme podle míst.

Lístek obsahuje tyto údaje: Příjmení, jméno, přesnou adresu a v druhém sloupci údaje o věku, povolání, funkci, odkud jsme údaj zjistili a příp. poznámky („zasílat oběžník“ apod.).

Vzor:

NOVÁK František	21. V. 1932
Bieblova 35	úředník, jedn.
Nechanice	S JT 1958
okr. Hradec Král.	

Údaje zjištěné sledováním esp. tisku nejsou tak úplné. Zašleme-li však takovému „novému“ příští oběžník, údaje se doplní. Vzor adresy z tisku:

NOVOTNÝ, Josef	27j.
U křížku 247	laboristo
Litomyšl	HdE 1958 VI
okr. Svitavy	filatelisto


Systematická kartotéka, řazená podle míst, rozlišuje kraj (rozřaďovač levý), okres (prostřední) a místa (pravý). Kraje lze číslovat buď od 1 do 10, nebo podle nového číselníku 01 (Praha), 02 Středočeský, 03 Jihočeský, 04 Západočeský, 05 Severočeský, 06 Východočeský, 07 Jihomoravský, 08 Severomoravský, 11 Západoslovenský, 12 Stredoslovenský, 13 Východoslovenský. Okresy na prostředním rozřaďovači mají abecední pořadí.

Abecední kartotéka se řadí bez ohledu na místo.

Barevnými jezdcí se dají označit příslušníci některých povolání, pokud je to účelné.

Schéma kartotéky

06 Východočeský 10 Trutnov
Dvůr Králové n. L.



Zd. Hršel.

Esperanto v 6. jazyčném repetitoriu „Éléments de geologie”.

Geologická literatura v mezinár. jazyku esperanto byla obohacena o další významnou publikaci, kterou vydala na podzim 1965 Société d'édition d'enseignement supérieur (5, Place de la Sorbonne — Paris 5e). Autorem je vynikající francouzský geolog André Cailleux, profesor geomorfologie na Sorbonně, který podepsal petici Mezinárodnímu geologickému kongresu v Praze, aby esperanto bylo přijato za jeden z oficiálních jazyků na 23. zasedání.

V úvodu ke své knize prof. Cailleux píše, že jejím úkolem je seznámit studenty různých národů se základy geologie pomocí 6-jazyčného textu. Že pro všechny vědecké pracovníky by však bylo nejideálnějším řešením, kdyby se veškerá vědecká literatura přeložila do mezinár. jazyka. Proto je na konci knihy věnováno místo základům esperanta a bibliografii nejdůležitějších vědeckých slovníků v esperantu.

Knihy je uspořádána tak, že je možno současně sledovat na levé straně text německý, španělský a esperantský, na pravé straně ruský, francouzský a anglický. V krátkých větách, formulovaných s pověstnou francouzskou vytříbeností a logikou, se probírají všechny hlavní disciplíny geologické. Po všeobecné kapitole následují: geofyzika, mineralogie, petrologie, paleontologie, exogenní dynamika, endogenní dynamika, stratigrafie a antropologie.

Autorem esperantského znění je Robert Gérard, čestný profesor pařížské Sorbonny. Na celkové redakci spolupracovali známí odborníci z evropských universit (Cambridge, Moskva, Madrid aj.) a výzkumných ústavů.

Naše státní pedagog. nakladatelství by nemělo zůstatí pozadu za svou francouzskou kolegyní, Vydavatelskou společností pro vysokoškolské vyučování. Věnuje ve svém edičním plánu zaslouženou pozornost mezinár. jazyku, kterým dnes mluví na světě už několik milionů lidí?

Josef Kavka

VIZITU LA URBON LITOMYŠL, ĈEĤOSLOVAKIO

La kastelo de Litomyšl, nacia kultura monumento, estas la plej bone konservita ekzemplero de renesanca arkitekturo en Ĉeĥoslovakio kaj en Centra Eŭropo. En 1568 konstruis ĝin la itala arkitekto Ĝiovanni Battista Avostalis de Sala. Atenton meritas la sun- kaj aeroplenaj arkadoj kaj artismaj sgrafitoj en la interna kastelkorto, kiujn oni kreis laŭ la desegnoj de Rafaelo de Santi, kaj kiuj prezentas scenojn el la greka kaj romia mitologioj. Epokstile establitaĵoj kun murpentraĵoj el la fino de la 18-a jarcento entenas kolektojn de diversaj specoj de porcelanaĵoj, meblaro kaj bildoj.

Unika interesaĵo de la litomiŝla kastelo estas la kastela teatro el 1797. La viena imperiestra kortega teatra pentristo Jozefo Platzer estas la aŭtoro de ĝiaj 16 plene konservitaj kompletaj scenoj.

La monda muzikpubliko scias, ke en la kastela areo troviĝas la naskiĝloko de la plej granda ĉeĥa komponisto Frederiko Smetana. Li naskiĝis en 1824 en la konstruaĵo de la iama kastela bierfarejo. La naskiĝloĝejon de Smetana oni piece establis kiel etan

muzeon de memoraĵoj kaj dokumentoj pri liaj vivo kaj kreado.

Ŝatantoj de malnovaĵoj trovos en la epokaĝa Litomyšl ankaŭ plurajn memorindaĵojn pri gloraj tempoj de la ĉeĥa historio kaj pri ĝiaj grandaj personoj, el kiuj antaŭ ĉio ni citu la verkistojn Alojzio Jirásek kaj Božena Němcová, la pentriston Julio Mařák, la scienciston Zdeněk Nejedlý kaj aliajn.

Litomyšl situas ĉe la ĉefŝoseo n-ro 35 Inter Prago kaj Brno (165 km distance de Prago kaj 90 de Brno).

„Naše vojsko“ en Prago eldonos ĉeĥan tradukon de O. Kníchal de du islandaj sagaoj esperantigitaj de B. Ragnarsson. Estas ŝajne la unua traduko el la islanda per la ponto de Esperanto."

(Revuo Esperanto, oktobro 1966)

Noto: Ambaŭ sagaoj aperos la unuan fojon ĉeĥlingve. Por la sama eldonserio estas preparata plua kolekto de la vietnamiaj popolrakontoj.

Esperantským kroužkům!

Při příležitosti 80. výročí trvání esperanta vyjde péčí Čs. esperantského výboru v Praze 2, Blanická 4, jako separát Osvětové práce v nákl. 16 000 výtisků publikace O. Kníchala „Informace o mezinárodním jazyku", která přináší přehledné informace o vývoji a organizaci esperantského hnutí (včetně statí o ČSSR) a aplikaci esperanta v mezinárodních stycích. Je určena především pro širší publikum, bude však vítanou pomůckou také pro vedoucí kurzů, funkcionáře a ty, kdo z jakýchkoliv důvodů nemají možnost přístupu k základní literatuře o esperantu a problémech mezinárodního jazyka. — Hromadné objednávky (nad 100 ks) zasílejte na Esp. kroužek ZK ROH Závody B. Němcové, Teplice a EK Čs. státních lázní, Poděbrady.

Cena brožúrky asi 1 Kčs.

Pamatujte na nábor širokého okruhu zájemců!

—OKN—

ĈE AMIKOJ ENI FRANCIO

Invitis min Tuluza Esperanto-Asocio por prelegi en 16 diversaj urboj en Esperanto por neesperantista publiko. Mi vizitis tiamaniere la urbojn Muret, Toulouse, Castres, Perpignan, Narbonne, Bezires, Montpellier, Nimes, Marseille, Avignon, Aixen-Provence, Hyeres, Nice, Tours, Angers, Le Mans. La celo de mia vojaĝo estis propagandi ne nur Pragon kaj Ĉeĥoslovakion per koloraj lumbildoj kaj specimenoj de ĉeĥa folkloro muziko, sed demonstri al la publiko, kiel facile parolebla estas la Lingvo Internacia kaj kiel lerte kaj flue kapablas ĝin traduki ekzemple en kelkaj urboj samtempe du, tri interpretistoj. Propagando neentruda kaj nepre multe efika, kiel konstatis la aranĝintoj post fino de mia prelegvojaĝo post unu tuta monato, kiun mi pasigis en Francio.

Unue la tereno estis jam anticipe bone preparita per grandformataj afiŝoj kun mia portreto kaj kun allogaj titoloj de prezentota temo „Prago Centtura, Ora Urbo", La Vespero Ĉeĥoslovaka, ĉeĥa muziko. En ĉiuj urboj estis la sama afiŝo, ĉie estis dissenditaj multnombraj invitiloj kaj la afero jam tre bone antaŭenmarŝis.

Ĉu la temo allogis tiom da publiko, granda intereso pri Prago kaj nia lando, aŭ jam la fakto mem, ke la prelego estos prezentita en flua Esperanto tuj interpretota, jam mem vekanta intereson pro sia nekutimeco? Ĉiukaze la intereso estis eksterkutima, ĝenerale venis aŭskulti la prelegon 80, 100, 150 — kaj en Perpignan ja 250 personoj. Kaj la preso, la ĵurnalistoj svarmis inter la publiko fotografante surloke la ĉeestantojn kaj prelegantinon kun interpretistoj. Kaj la artikoloj, kiuj ĉiuloke aperadis taj sekvan tagon en ne unu, sed eble en du diversaj gazetoj, vidigis grandan simpatian ne nur por nia lando, ĝia ĉefurbo, nia popolo, sed ankaŭ tre favore propagandis Esperanton pledante por ĝi kiel por lingvo fleksebla kaj samegala al la aliaj lingvoj. En Toulouse kaj en Perpignan kaj Angers mi estis intervjuita de Radio.

Preskaŭ en ĉiuj urboj venis al mi en la paŭzo kaj post la prelego ĉefdevenaj samlandanoj, kiuj longe vivas en Francio, sed ne forgesis sian patrujon. Kortuŝe mi aŭskultis en Toulouse patrinon, kiu tiom sopiras pri Prago kaj sian filon edukis en ĉeĥa lingvo, kvankam li jam vere naskiĝis en Francio. Tiom da homoj ŝatis aŭskulti min paroli pri Prago kaj diversajoj ankoraŭ post la prelego, ke la ekestintaj debatoj ofte daŭris unu horon ĝis noktomezo (la prelegoj komenciĝis ĝenerale je la 9a horo vespere). Multaj homoj enskribis por si mian adreson kun la deziro, ke mi gvidu ilin tra Prago, kiam ili vizitos.

Nur trifoje mi loĝis en hotelo, alie ĉe francaj familioj, kiuj gastigis min kaj kie mi sentis min kiel hejme. Mi ligis multajn novajn amikecojn. Mi trovis multe da similaĵoj kun la franca historio, prelegante detalojn el la ĉeĥa, kio forte impresis la francan publikon.

En Toulouse, Muret kaj Castres estis tuj post la prelego venditaj ĉiuj Esperanto-lernolibroj aŭ broŝuroj pri Esperanto.

En Perpignan la programo estis miksitaj per katalanaj kantoj, kio riĉigis la programon; en Marseille la ejo estis tro malgranda, la publiko estis tiel multnombra, ke en lasta momento estis necese ŝanĝi ĝin por pli konvena. En Angers antaŭ la prelego estis projekciita mallonga informa filmo pri Norda Bohemio, kio montriĝis tre efika enkonduko fare de la aranĝintoj.

Por mi plej granda ĝojo estis kalkuli kun la aranĝintoj post fino de mia prelegvojaĝo, kion ni gajnis. Ni sukcesis konvinki la publikon, kiu mem ekinteresiĝis pri Esperanto; ni bone kunlaboris por nia komuna celo, ni antaŭenmarŝigis la Esperanto-movadon en Francio, klel oni asertis, kaj krom tre riĉaj impresoj pri la lando, pri kiu mi revis, kiun mi povis viziti kaj ĝui ĝian belecon, kies bonkorajn homojn mi por eterne enskribis en mian koron, mi hejmenportis la senton, ke mia prelegvojaĝo ne estis vana, ke mi povas esti kontenta pri bone plenumita devo por ni ĉiuj.

Per tiu ĉi vojo mi volas esprimi mian kontenton kaj dankon al ĉiuj, kiuj meritiĝis pri plenumo de mia deziro, viziti Francion, kaj samtempe esprimi al Tuluza Esperanto-Asocio mian admiron pro bonega organizado de la tuta prelegvojaĝo. Ne estas eble forgesi la francan gastamecon, amikecrlatojn kaj la sukcesojn de nia komuna laboro sur la kampo de Esperanto.

Jana Cířhová

LA PRAGA INFORMA SERVO HAVAS ESPERANTLINGVAN GVIDISTINON

Ĉi tiun avantaĝon la unuan fojon eluzis dana karavano de esperantistoj, kiu survoje al la Universala Kongreso en Budapeŝto haltis en Prago kaj volis trarigardian ĉefurbon dum kvar horoj. La grupanoj, inter kiuj estis ankaŭ svedo, metis florkronon al la tombo de la dana astronomo Tycho de Brahe en la Týn-katedralo, kaj plua rubando kun Esperanta surskribo vekis la intereson de la vizitantoj.

La dua grupo konsistis el francoj, kiuj mendis ĉe la Praga Informa Servo gvidistinon, parolantan france, sed ankaŭ ili estis vojaĝantaj al la Kongreso. Kiam ili eksciis, ke la mendita gvidistino estas Jana Čichová, samideanino, bone konata kiel verkistino el diversaj Esperanto-revuoj, kaj parolantino de Radio Prago, ŝi devis paroli nur esperantlingve. La aŭtoĉaroj estis du, kaj en la dua estis gvidistino, parolanta nur france. Sed mirinde, ŝiaj grupanoj unu post la alia aliĝis al la dua grupo por aŭskulti la eksplikojn en Esperanto. La estrino de la grupo, francino, kiu ne konis kaj laŭŝajne ankaŭ ne ŝatis Esperanton, komence rifuzis la esperantlingvan gvidadon. Sed vidante la deziron de la grupanoj, ŝi cedis kaj finfine ankaŭ ŝi aŭskultis kun intereso la eksplikojn de s-anino Jana, nur de tempo al tempo petante klarigon pri iu vorto.

La tria grupo estis italoj. Ili jam anticipe petis la tutŝtatan vojaĝagentejon Ĉedok pri gvidisto esperantlingva, sed ĝi plurfoje resendis al ili la leterojn, kun rimarko, ke ili skribu itale kaj ke esp.-lingva gvidisto ne estas je dispono. Sed en la grupo estis ankaŭ japanoj, nederlandano, francino kaj familio el Usono, kiuj tute ne kontentiĝis kaj komencis plendi kontraŭ la agentejo.

Do venonttage oni denove devis uzi la servojn de s-anino. Jana. La grupanoj plene rekonis la bone parolatan lingvon kaj fakan eksplikon pri la pragaj vidindaĵoj, kaj ĉefe — diris tion ankaŭ al la agentejo.

Ĉi kazo plene demonstris la utilecon de la Internacia Lingvo, kaj vekis la intereson de niaj oficialaj instancoj por la vojaĝ-servo. Oni eĉ asertis, ke venonte oni konsideros Esperanton lingvo samvalora al iu ajn alia.

Por ni esperantistoj ĉi tiu afero estas vere tre instrua. Se ĉiuj esperantistoj, kiuj vizitas fremdan landon aŭ urbon, persiste postulus esperantlingvajn servojn sammaniere, kiel la itala grupo, tio estus la plej deca kaj samtempe la plej efika formo de la batalo por rekono de la Lingvo Internacia kaj por ĝia enkonduko en la praktikon.

Fx

(Rim. de la red.: ĵus ni ricevis la sciigon el Bratislava, ke s-anino. A. Mahrová faris ekzamenon pri faka gvidado de fremdaj vizitantoj tra la urbo. Ŝi regas la slovakon, hungaran, germanan lingvojn kaj Esperanton kaj estas delegitino de UEA por turistiko).

Pracovní plán Sekce mládeže ČSEV

1. Uspořádání 1. mezinár. semináře mladých esperantistů ve dnech 2.-16. 7. 1967, v osadě ČSM Turyň v Borku u Jílového (okr. Praha-západ). Cílem semináře je mezinár. výměna poznatků a zkušeností z oblasti mládežnického hnutí, posílení pozic mladých čs. esperantistů na mezinár. fóru a získání nových přátel Československu. Organizátorem je OV ČSM Praha-západ ve spolupráci se Sekcí mládeže ČSEV.

2. Svolání celostátní konference mladých esp-istů v srpnu 1967 do Bratislavy s mezinár. účastí.
3. Další vydávání Zpravodaje jako stálého informátora mladých čs. esperantistů.
4. Vydávání esp. buletinu Sekce mládeže ČSEV pro zahraniční partnery 1-2X ročně.
5. Vydání učebního a zkušebního řádu ve Zprávách ČSEV č. 3-4/66.
6. Mezinárodní sezóna 1967.

Dodatek k pracovnímu plánu:

Sekce mládeže ČSEV ve svých rozhodnutích, jednáních a způsobu práce se řídí zásadami práce ČSEV, které vychází z dlouhodobé linie všestranného rozvoje socialistické společnosti tak, jak ji určil XII. sjezd KSČ.

1. Upevňování přátelství a spolupráce s mládeží socialist. zemí a pokrokovou mládeží celého světa v duchu proletářského internacionalismu.
2. Pomoc při rozšiřování a upevňování mezinár. demokratického hnutí mládeže a při vedení boje za světový mír.
3. Pomocí esperanta rozšiřovat nové vědomosti z oblasti vědy, techniky, kultury a umění.
4. Účelné využití volného času části členů ČSM.
5. Propagace úspěchů naší socialistické vlasti ve světě.
6. Informace o organizaci činnosti a úspěších ČSM všem ostatním mládežnickým organizacím v zahraničí.

Slibný rozvoj ČSEV a v jeho rámci sekce mládeže zaručuje usnesení XIII. sjezdu KSČ, kde se mimo jiné praví: „Nedílnou součástí politické organizace naší společnosti jsou společenské organizace. Jejich činnost je nutno dále intenzivně rozvíjet tak, aby uspokojovala různorodé zájmy pracujících ve shodě s plněním společenských potřeb.“

Interŝanĝas Esp. glu-, poŝt-markojn kaj poŝtstampojn

J. F. Mazánek, Západní 4, OSTRAVA II.

E. A. Gubanov, Ul. Karla Marksa 23-4, SOSTKA (Sumskej obl.) USSR dez. kor. pri sporto, kaj iŝ. pm. kaj diskojn kun jazmuziko.

S-ro OYA Shirinda Dentonaí, ZNO ZINO 4, Koraku, Bunkio, Tokio, Japanujo, dez. kor. kun ĉeĥoslovakaj samideanoj.

Rezoluclo de Junulara Sekcio de ĈSEK favore al VDR

Okaze de la 21-a datreveno de la fondo de Vjetnamia Demokratia Respubliko la partoprenintoj de la 2-a TAJE en Olomouc la 3.-4. de septembro 1966, esprimis siajn simpatiojn al la vjetnamia popolo, kiu anstataŭ soleni tiun ĉi festodaton devis defendi sian liberecon. Esprimante la volon kaj sentojn de la ĉeĥoslovakaj junaj esperantistoj ili kun indigno kondamnis la barbaran agreson kontraŭ la memstareco

kaj sendependeco de VDR. Venku la justa afero de la heroo vietnamia popolo!

Rozměry E-vlajky

Podle „Konstitucio de la Esperantismo” při délce 120 cm je odpovídající šíře 84 cm, bílý čtverec 40 X 40 cm v horním rohu u žerdi, v něm zelená pěticípá hvězda; střed čtverce se shoduje se středem hvězdy, jejíž jeden cíp musí směřovat k hornímu kraji vlajky.

Jiří Kořínek atentigas!

(Skribmaniero de propraj nomoj)

En Esperantaj tekstoj, precipe tradukitaj el la ĉeĥa lingvo, ni povis en lasta tempo renkonti sekvantan malkorektaĵon.

Ekzemple tekstis: „František Liszt veturis de Výmar al Drážd’any kaj poste li ŝipveturis sur rivero Labe ĝis Hřensko.” Aŭ: „Karel May . . . skribis tie sian romanon Kristnasko (Vánoce)... sur la bordoj de rivero Labe...” Korekte devas teksti: „Franz Liszt veturis de Weimar al Dresden (aŭ Dresdeno) kaj poste li ŝipveturis sur rivero Elbo ĝis Hřensko.” „Karl May . . . skribis tie sian romanon Kristnasko (Weihnachten) ...sur la bordoj de rivero Elbo...”

Kial? Ĉar ni en Esperanto uzas por la propraj nomoj aŭ la proprajn nomojn — personajn aŭ geografiajn — kiaj ili estas en la koncernaj lando aŭ nacia lingvo, aŭ kie ekzistas formoj Esperantaj, ni prefere uzas tiujn (Dresdeno, Prago, Parizo). Ĉe grandaj riveroj, montaroj, kiuj trapasas plurajn landojn kaj estas al ili komunaj, kaj havas do plurlingvaj nomojn, kiel ekz. Danubo, Rejno, Elbo, Alpoj, Gigantmontaro, k. s., oni uzas ekskluzive la Esperantajn nomojn. Tial en la suprecititaj kaj similaj tekstoj oni skribu Franz Liszt (ĉar li mem sin tiel skribis) aŭ laŭ lia hungara nacieco Ferenc Liszt, Weimar, Dresden (Dresdeno), Karl May, ĉar temas pri germana, resp. german-hungara, verkisto kaj komponisto kaj pri germanaj urboj. Hřensko tekstu ĉeĥe, ĉar ĝi troviĝas sur ĉeĥoslovaka teritorio. Se en la koncerna historia tempo apartenis la urbo al alia ŝtato aŭ havis alian nomon ol nun, ni kutime uzas la tiutempan nomon oficialan; ekz. se temas pri 19-a jarcento, do povas resti Brixen (nun Bressanone), Eger (nun Cheb), Petersburgo (nun Leningrado). Se oni citas apud la Esperanta nomo de la verko ankaŭ la originalan, do ĝi estu tiu de la originalo, do „Kristnasko (Weihnachten)”.

Jiří Kořínek

INDEKSO SEMOJ, bulboj kaj vivaj plantoj. Oferto al interŝanĝo. Eld. Botanika ĝardeno de Veterinara universitato Brno — ĈSSR. Broŝuro 24p. 10 X 21 cm. Teksto esperanta kaj ĉeĥa, 770 nomoj de la oferataj plantoj latinaj kaj ĉeĥaj.

Jen bonega ekzemplo kiamaniere esperanto povas (kaj povus) servi al la scienco kaj komerco. Certe ĉiu plantkulturanto, kutima al la latinaj radikoj de la internaciaj plantnomoj, senpene komprenos la enhavon de la teksto, eĉ se li neniam lernis esperanton. Kaj eble li eĉ ekemos ĝin lerni.

Aliflanke la esperantiston la listo de la latinaj plantnomoj rekte instigas anstataŭigi la latinajn finaĵojn per esperantaj kaj fonetikigi la skribon ekzemple

Erigeron acre — Erigero akra

Helianthus tuberosus — Helianto tuberoza

per kio la tuta nomaro estus kaj esperantigita, kaj internacie komprenebla.

Fx.

Fondiĝas organizaĵo de teknikistoj-esperantistoj

Teknikista Internacia Societo de ISAE estas provizora nomo de formiĝanta esperantista organizaĵo de teknikistoj. La unuaj kontaktoj kaj kunsidoj de teknikistoj okazis en kadro de la UK en Budapeŝto. La iniciato venis el Hungario kaj Bulgario. Estas jam starigita provizora komitato, oficiala fondiĝo estas antaŭvidata en la jaro 1967. Ni atentigas pri tiu ĉi fakto ĉiujn niajn teknikistojn, el ĉiuj branĉoj de tekniko. Kiu el vi deziras jam nun informiĝi aŭ helpi, turnu vin al la reprezentanto de TIS por Ĉeĥoslovakio: Ing. Jan Werner, Košice, Vodárenská 8.

ĈSEK kaj ĈS Komisiono de UNESCO komencis kunlabori. ĈSEK delegis k-dinon J. Cíchová en la sekcion de amasaj komunikiloj kaj en la kulturen sekcion k-don red. O. Kníchal.

Esperanto el la etero. Laŭ la statistiko de — Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED), la nombro de la radiodisaŭdigoj en la Internacia Lingvo en 1965 ampleksis 1807 elsendojn (en 1964-1622), kun 662.5 horoj (en 1964 518). En la jaro 1965 funkciis 25 radiostacioj en 13 ŝtatoj, kiuj elsendadis ankaŭ esperantlingve (en 1964-22 en 11 ŝtatoj).

Kiel ĉiujare, ankaŭ en 1965 gvidis Radio Varsovio per 365 elsendoj dum 182,3 horoj.

En 1966 Hungara Radio Budapeŝto dum duonjaro elsendis Esperante 171-foje kvaronhoron tage, do entute dum 43 horoj. Espereble ĝi daŭrigos siajn elsendojn esperant-lingvajn kaj per tio kontribuos al plua plialtigo. Ĉi-jare ankaŭ Radio Praha elsendadis jam dufoje monate po 10 minutoj. Bedaŭrinde pro nova aranĝo de la elsendado por eksterlando la Esperanta estis komence de oktobro 1966 provizore elvicigita.

Ohlas na článek v Mladém světě

Těsně před celostátní konferencí mladých esperantistů vyšel v 17. čísle Mladého světa interwiev s předsedou Sekce mládeže ČSEV Mikulášem Nevanen a vedoucím pražského Junulara Rudolfem Tyllerem o esperantu. Byl to sice krátký článek, ale splnil svůj úkol. Informoval širokou veřejnost o tom, co to vlastně esperanto je, a hlavně, kde se scházejí pražští esperantisté. Náš E-klub v Řeznické 17 tak navštívilo zatím 19 nových mladých zájemců.

V přespříštím čísle vyšla zase krátká zprávička s adresou Osvětového ústavu. Dosud přišlo na jeho adresu 36 dopisů od mladých lidí z celé republiky. Žádali podrobné informace o esperantu, nikdy dříve o něm neslyšeli.

Tady je vidět špatná nebo nedostatečná propagace esperanta samotnými kroužky, protože lidé ani nevědí, jestli v jejich místě nějaký klub či kroužek je.

Jak ty informuješ své okolí? Jak jsi využil článku v Mladém světě k propagaci mezinárodního jazyka?

M. Jirásková

Esperanto kiel interkomprenigilo inter samgepatraj fratoj!

Julio kaj Jozefo Fekete estas fratoj hungaroj. Ili kreskis en Bratislavo, sed en 1919 Julio transloĝiĝis en Budapeŝon kaj Jozefo estis okupata diversloke inter slovakoj kaj poste li eĉ edziĝis al slovakino. Post longaj jaroj, dum kiuj ili ne havis la okazon renkontiĝi, Julio forgesis la slovakon kaj Jozefo la hungaran lingvojn. Feliĉe ili trovis interkomprenigilon. Tial vi nun povas ilin renkonti ĉefe en Dudince, kiel ili interparolas — esperantlingve! Julio, la hungara, instigis Jozefon, la slovakon, ke li fondu Esperanto-rondeton kaj tiamaniere ekestis Esperanto-rondeto en Žiar nad Hronom. Iliaj adresoj: Julio Fekete, Budapest VII, Vörösmarty u. 17. II. 12/A, Hungario. Jozefo Fekete, Žiar nad Hronom, Ul. Obrancov mieru 11/10. Skribu kaj gratulu al ili, ke ili solvis la ekestintajn lingvajn barojn favore al Esperanto.

Ni funebras.

La 17-an de novembro 1966 tragike mortis en Prago Fraŭlino Aloisie Plzenská. Ŝi estis komitatanino kaj fervora bibliotekistino de la iama Rondeto de Esperantistoj en Prago. Honoron al ŝia memoro.

En decembro ĉi-jara mortis en Martin Alojzio Janza, direktoro de Internulejo de Meza Sanitara Lernejo, post longa, suferiga malsano. Antaŭ sia malsaniĝo li aktivis en E-rondeto en Martin kaj siatempe ankaŭ en la skolta esperantismo.

Ing. Vlastimil Novobilský, místopředseda E-kroužku Domu kultury pracujících v Ústí n/Labem získal titul kandidáta věd a odešel k prohloubení své vědecké činnosti na rok na universitu v Heidelbergu. — K tomuto významnému úspěchu mu upřímně a srdečně blahopřejeme.

Miloš Hruška, dosavadní předseda E-kroužku Domu kultury pracujících v Ústí n/Labem a člen Čs. esperantského výboru pro kraj Severočeský, odešel na nové pracoviště do Liberce. Vedením E-kroužku v Ústí n/Lab. byl pověřen Ing. Karel Fanta. Upozorňujeme kroužky, aby v záležitostech krajského charakteru nadále spolupracovali se s. Hruškou (nová adresa: Chelčického 292/3 Liberec) a současně informovali E-kroužek v Ústí n/L., v zájmu koordinace činnosti.

Esperanto en Dresdeno. Ĝoje ni povas komuniki, ke Esperanto-grupo de Dresdeno nun kunvenadas ĉiujn ekde la 19-a ĝis la 22 h. en la klubejo de „Puŝkindomo“. Adreso: DDR 8023 DRESDEN, Alexander-Puschkin-Platz 1 (atingebla per tramoj 10,14 kaj 15. Gastoj estas ĉiam bonvenaj.

Brazilano, 40 jara kemiisto, dez. interŝ. pm kun ĉiuj landoj. Li sendos brazilajn

p. m. kaj p. k. Adreso: S-ro Jacques Auguste COURBET — Praia do Flamengo, 254 — Apto. 404 — Flamengo, Z C-01 — RIO DE JANEIRO, G8, Brazilo, Sudameriko.

Esperantské filmy. „Fiat 850" —zapůjčení žádejte u Vladimíra Bořánka, Plzeň, Blatenská 23. — „Novozéland'ané" — zapůjčuje Drahomír Kočvara, Ostrava-Zábřeh, Dolní č. 1. Zapůjčení obou filmů žádejte 6 týdnů předem a zároveň přiložte úhradu poštovného. Český překlad je připojen k filmu. — Je žádoucí, aby filmy byly předvedeny co nejširším vrstvám veřejnosti. Nabídněte je školám, internátům a dělnickým ubytovnám. Na dobrém využití těchto filmů závisí dodání dalších filmů v esperantské verzi.

Pola Esperanto-píoniro dankas al Ostravanoj

„Mi dankas al Esperantista Rondo de Tramistoj por sincera bondeziro okaze de mia 80-jara naskotago kaj samtempe mi deziras multe da sukcesoj al renkontiĝo de esperantistoj en Ostrava. Mi salutas ĉiujn. Nun mi povas jam trankvile foriri de ĉi tiu mondo, ĉar mi vidas, ke jam estas novaj homoj, kiuj batalos por la ideoj, por kiuj ankaŭ mi batalis dum mia vivo."

Stanislaw Bogdanowicz, Wisla Uzdrowisko 935. pow Cieszyn, Pollando.

Esperanto en la praktikon! Maŝinfabrikoj en Přerov eldonis multkoloran teknikan prospekton, ekipitan per multaj fotografiaĵoj. Ĝi temas pri ceramika maŝinaro, sanitara ceramikaĵo, ceramikaj produktaĵoj kaj elektro-porcelano, fabrikataj en Ĉeĥoslovakio. Interesuloj el la tuta mondo povas ĝin ricevi kontraŭ libervola rekompenco. Bonvolu skribi al la jena adreso: ZK Esperanto, Přerovské strojírny PREROV, Ĉeĥoslovakio.

Esperantistoj, vizitontaj la urbon Bratislava, unuope aŭ amase, anoncu vian alvenon al Mestský dom kultúry a osvety (Urba Domo de Kulturo kaj Klerigo), Bratislava, Suché Mýto 17 kaj vi ricevos esperantlingvan gvidanton, kiu montros kaj klarigos al vi la historiajn kaj kulturajn vidindaĵojn.

KAŽDÝ ČESKOSLOVENSKÝ ESPERANTISTA NECH SI PREDPLATÍ „ZPRÁVY ČSEV"; PAMATNICU TVORIVEJ PRÁCE A ČESTNÉHO SNAŽENIA HNUTIA V NAŠEJ KRAJINE.

ĈIU ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTISTO ABONU „INFORMOJN DE ĈSEK", MEMORLIBRON DE LA KREA LABORO KAJ HONESTA STREBADO DE NIALANDA MOVADO.

KAŽDÝ ČESKOSLOVENSKÝ ESPERANTISTA NECHŤ SI PŘEDPLATÍ „ZPRÁVY ČSEV", PAMÁTNÍ KNIHU TVOŘIVÉ PRÁCE A ČESTNÉHO SNAŽENÍ HNUTÍ V NAŠÍ ZEMI.

El la agado de niaj rondetoj

Renkontiĝo de esperantistoj en Dudince, sudslovakia evoluanta banurbeto, la 24-25an de septembro 1966, plene sukcesis. Organizis ĝin s-ano Ernesto Váňa, kio pruvas, ke eĉ unusola persono povas multon fari por nia afero. Sabate ĉeestis pli ol 130 geesperantistoj kaj la sabatvesperan programon en la baneja restoracio 270 personoj plejparte neesperantistaj. Salutparolis k-do Ferjenčík en la nomo de Loka Nacia Komitato, k-do Slančík en la nomo de Domo de Kulturo, por la Ŝtata Banejo D-rino Kusý, por ĈSEK vicprezidanto Čambál kaj fine k-do Sirotko, prezidanto de la loka E-rondeto. El inter la eksterlandaj gastoj alparolis s. Hubalek, s. Rentmeister, ĉefdelegito de UEA kaj s. Balague, ĝen. sekretario de MEM, ĉiuj el Aŭstrio, s. Breuer el GDR kaj s. Fekete el Budapeŝto. Tre interesa estis la ludo de ĉefŝafpaŝtisto je fajfilego (fujara) la piano kaj harmonika ludoj de gejunuloj kaj la dancado de junaj ges-roj Balague. Poste la esperantistoj foriris al la tendaro kie estis bruligita bivaka fajro kaj daŭrigata la amuzprogramo per Esperanta kantado de gejunuloj el Žitavice sub gvido de lernejestro Gaál, kun muzikakompano. — La dimanĉa antaŭtagmezo estis dediĉita al prelegoj de martinaj samideanoj Špigúth, Izák kaj Čambál pri la historio de la artefaritaj lingvoj kaj Esperanto, pri la en- kaj ekster-landa movadoj kaj iliaj perspektivoj. Al la renkontiĝo sendis delegitojn la Regiona Kulturcentro en Banská Bystrica, kio signifas kvazaŭ oficialan rekonon de niaj movado kaj strebado.

ESPERANTO-RONDETO ĈE ZK SVIT, ZPS RŘ, GOTTWALDOV

La kunvenoj okazadas ĉiuvendrede je la 19-a horo (krom festotagoj) en la uzina ejo de ROH (ĉe la aŭtobusa stacio. Dimanĉe antaŭtagmeze kunvenadas studrondeto, kiun gvidas s-ano Gerža.

Por la subskribkampanjo al UN ni akiris 150 pluajn individuajn subskribojn. La rondeto prizorgadas 6 vitrokestojn ESPERANTO-SERVO kaj du informtabulojn (en hotelo Moskva kaj en la fervojstacidomo Otrokovice. La informservon uzis esperantistoj el Pollando, Hungarujo, Aŭstrujo, Litova SSR, Argentino k. a.

La someran Esperanto-tendaron en Lančov partoprenis 4 membroj, do ne mankis al ni instruistoj. Ni kunlaboris kun la rondetoj astronomia, filatela, turisma kaj Svazarm.

Sep rondetanoj veturis ripozcele laŭ invito Jugoslavion. Ili vizitis Dubrovnik, Split, Rjeka, Pula-Istrio kaj plejparte restis ĉe amikoj en Medulin apud Pula.

La UEK-n en Budapeŝto partoprenis nia delegito s. Matulik.

Efektiviĝis ĝemeliĝo en la kadro de ĝemeliĝo de SVIT kun la ŝufabriko en Borovo-Jugoslavio kaj kun la urbo Romanc en Francujo. Ĉi-lastaj estis ligita okaze de vizito de kvar urbaj reprezentantoj de Gottwaldov en Romanc kaj nia rondeto kunlaboras per tradukoj de korespondaĵo el Esperanto en la ĉeĥan kaj inverse.

La rondeto kunlaboras kun la distrikta referento por turismo kaj helpas ĉe eldono de broŝuro pri Gottwaldov ankaŭ en Esp-o. Krom tio en la publikaĵo pri nia urbo, aperonta en 1977, laŭ la promeso de la referento estos ankaŭ tekstoj en Esperanto.

PIESOK:

La kurso por komencantoj en PIESOK, kiu komenciĝis la 15-an de novembro 1965, finiĝis sukcese la 25-an de aprilo 1966. La kurson absolvis 18 gekursanoj, kiuj trastudis 20 lecionojn el slovaka lernolibro de Šatura-Rosa. La gekursanoj jam nun memstare korespondas kun alilandaj gekorespondantoj. Okaze de kursfiniĝo ni aranĝis amikan letervesperon, nia rondeto ricevis 168 salutojn el 24 landoj. La ricevitan materialon ni utiligas por konstanta ekspozicieto en montrofenestro en Piesok. La 28-an de marto 1966 vizitis nian kurson filmistoj el Dokumenta filmo el Bratislava, kiuj filmis nian kurslecionon kaj interesiĝis ankaŭ pri la materialo por letervespero. La rezulton de nia kaj ilia laboroj oni prezentis en aktualaĵ-programo en ĉiuj niaj kinejoj!

FIAT-filmon ni prezentis 3-foje en Piesok kaj ĉirkaŭaĵo. Pri nia agado disaŭdigis ankaŭ Pola Radio la 6-an de marto 1966 en dimanĉa magazeno „Sub la verda stelo”, kaj konstante raportas nia uzina gazeto: „Maŝinisto de Piesok”. Ni ankaŭ publikigis informan sciigon pri la distrikta E-movado en grava regiona tagĵurnalo „SMER”.

Lastatempe ni kolektis individuajn subskribojn por „Propono al UN”, ni varbis abonantojn por Esperanta-gazetaro (Informoj de ČSEK, Esperanto-Agado, Osvetová Práca ktp.). Dank' al afabla klopodo de s-ano Váňa, rondetgvidanto D-ro Nekuda fariĝis individua membro de UEA kaj poste ankaŭ Delegito de UEA por Podbrezová-Piesok.



Gekursanoj de D-ro V. Nekuda en Piesok.

Esperanto — rondeto ankaŭ en Valkovňa.

La 21-an de marto 1966 estiĝis en Valkovňa (distrikto Banská Bystrica) nova Esperanto-rondeto, en kadro de loka Kleriga klubo. La inaŭguran kunvenon partoprenis funkciuloj de Loka Nacia Komitato kaj multaj interesuloj, kiuj konatiĝis unue kun la problemoj de internacia lingvo, poste kun Esperanto kaj ĝia movado kaj fine oni prezentis koloran FIAT-filmon en Esperanto. Post sukcesa varbado komenciĝis la 4-an de aprilo 1966 kurso por komencantoj, kun partopreno de 15 gekursanoj. La kurson gvidas D-ro Nekuda. La rondeto zorgas ankaŭ pri konstanta ekspozicieto en montrofenestro de loka kinejo, kiu altiras la atenton de ĉiuj preterpasantoj. La prezidanto de la rondeto estas s-ro Jozef Komora (Valkovňa 39, distrikto B. Bystrica), sekretario Ondrej Baran, (Šváboľka 98, p. Valkovňa, distr. B. Bystrica).

LIPTOVSKÝ MIKULÁŠ. Esperanto- rondeto ĉe Muzeo de Janko Kráľ estis refondita la 4-an de novembro de 1964. Ĝiaj 12 anoj kunvenadas ĉiumerkrede je la 19-a horo. La korespond-adreso por la rondeto kaj la adreso de la gvidanto estas: Miloslav RYBÍN, Štúrova 26/e, Liptovský Mikuláš.

En la disaŭdigo de Distrikta Kleriga Domo, por la tuta distrikto, estas elsendataj ankaŭ programoj pri nia movado, ĉerpitaj el Esperantaj periodaĵoj. Ĝi okazadas ĉiumarde kaj ĉiujŝande inter la 17-17,30 h. Distrikta Kleriga Domo publikigas niajn informojn pri Esperanto en sia monata periodaĵo „Kultura Programo“. — La semajna gazeto „Nový Liptov“, organo de Distrikta Nacia Komitato kaj de Komunista Partio de Slovakio, kelkfoje aperigis artikolojn pri nia rondeto kaj diversaj lingvaj problemoj. — La rondetanoj, rimarkinte artikolojn pri Esperanto en la naciaj gazetoj, tuj reagas skribe per danko kaj instigo al pluaj informoj rilate la Esperanto-movadon. Ni reagas ankaŭ je ĉiu artikolo aŭ sciigo en nacilingvaj gazetoj, aludanta la mankon de lingvoscio en la servo por eksterlandaj gastoj (hoteloj, turistaj kabanoj, restoracioj, aŭtokampadejoj, vojaĝoficoj, vendejoj) kaj proponas kunlaboron. — Oni intencas eldoni la planon de nia urbo, kun Esperanta teksto kaj bildkarton kun saluto el Liptovský Mikuláš. Ni proponis kunlaboron al la Prepara Komisiono por soleni la 700-jaran jubileon de nia urbo, en la venonta jaro.

Ni petas la Esperanto-rondetojn skribi kaj danki pro la komprenemo al jenaj adresoj: Redakcia týždenník „Nový Liptov“, kaj Okresný osvetový dom, ambaŭ en Liptovský Mikuláš. Antaŭdankon!

BRATISLAVA

Esperanta rondeto en Bratislava, havanta spertajn pedagogojn kaj aŭtorojn de originalaj lernolibroj de Esperanto, intencas akiri junularon, precipe altlernejan por Esperanto. Unu el la plej taŭgaj vojoj ĝi vidas en ebleco enkonduki instruadon de Esperanto en alternejojn. Ĉi tiu celo subtenita de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato kaj Kleriga Institutu en Bratislava jam estas atingita. Dekano de Filozofia Fakultato de Komenský-Universitato en Bratislava akceptis la proponon kaj fondis lektoraton de Esperanto. Do altlernejanoj en Bratislava povis jam ekde aŭtuno viziti kurson de

Esperanto en Filosofia Fakultato. Kiuj altlernejoj sekvos la imitindan ekzemplon de Bratislava?

Renkontiĝo de esperantistoj en Plzeň la 2-4-an de junio 1967

ZK Škoda -- Esperanto-rondo Plzeň, Kopeckého sady 13, aranĝos Unuan renkontiĝon de esperantistoj „Esperanto 67 Plzeň”. El la provizora programo ni citas kelkajn erojn: Evoluo kaj progreso de Internacia Lingvo kaj ĝia nuntempa signifo. Novaj tendencoj en la instruado de Esperanto. Mondpaca Esperantista Movado. Junularo kaj Esperanto. Esperanto en scienco kaj turistiko. La programon kompletigas prezentadoj de Kant-rondeto de ZK Škoda, interkona kaj amuza vespero kun danco, trarigardo de la monkonata bierfabriko Prafonto kaj vizito de muzeoj.

Esperanto-rondeto en Tábor kunvenadas en „Střelnice” ĉiulunde vespere. Ĝia prezidanto estas la nelacigebla kaj konata aktivulo Inĝ. L. Krajíc. Al li helpas pluaj funkciuloj: Komzáková, Škorpil, Folková, Strnad, Kovrč, D-ro Preclík kaj D-ro Rajlich. Se vi vizitos la urbon Tábor, anoncu vin!

Esperanto-rondeto ĉe Uzina Klubo de Revolucia Sindikato en Poděbrady aranĝis la 5-12-an de junio 1966 I-an internacian ŝakturniron de esperantistoj. Ĝi okazis en la ejoj de la restoracio „Bílá růže” (Blanka Rozo) sur la bordo de la rivero Elbo dum belegaj sunaj tagoj. Partoprenis ĝin 10 ŝakludantoj el 5 landoj. La dimanĉan ekskurson per motorboato al Oseček partoprenis preskaŭ 140 esperantistoj el 8 landoj. La ŝakturniro kaj la tuta renkontiĝo estis vera manifestacio de ĉiuj esperantistoj por amikeco, kunlaboro kaj paco inter la nacioj.

Laboro por Esperanto en la distrikto Vsetín, en 1966

Januaro: prelego kun diapozitivoj — Vojaĝo tra Eŭropo por floroj, helpe de Esperanto (Chvatík, 150 vizitantoj). Februaro-marto: nova kurso por komencantoj kun 12 personoj. Aprilo: Filmoj — Novzelandanoj. Vjetnamio (80 partoprenantoj). Majo: prelego de Vesna Skaljer Race: Nuntempa Jugoslavio, kun filmoj (110 ĉeestantoj). — Ĉiujn publikajn aranĝojn ni eluzis propagandcele per ekspozicioj de Esperantaj libroj kaj aĵoj. — Nia rondeto eldonis: poŝtkartojn kun pentraĵo de akademia pentristo Hlavica (1000 pecoj) kaj du flugfoliojn (2000 pecoj). — Julio-aŭgusto: 9 membroj de la rondeto ĉeestis la UKE en Budapeŝto per uzina mikrobuso. — Septembro: decembro: du rondetoj po 8 personoj por komencantoj kaj 1 por progresintoj. — Ĉi tiujn aranĝojn ni anoncis ne nur per afiŝoj en la stratoj, sed ankaŭ per koloraj diapozitivoj en 5 kinejoj. Fine ni eldonis „Lernilon” Esperanto, lingvo internacia, kompilitan de nia rondetgvidanto Aleš Berka.

BRNO

Ekde septembro funkcias kurso ĉe Kultura Kleriga Centro por 16 gekursanoj. Instruas J. Vondroušek. Kurson por 6 personoj gvidas en sia laborloko s. J. Kolečka. Pri la kursoj atentigis 100 afiŝoj en la urbo, kiujn ni mendis ĉe la Junulara Sekcio de ĈSEK en Prago. La Klubo havigis al si grandan kvanton da prospektoj de firmao FIAT (ankaŭ estis projekciata ĝia kolora sonfilmo en Esperanto) kaj la luksajn kajerojn de Naturamikoj, fine el Pollando poŝtkartojn pol- kaj esperantlingvajn, kiujn ni sendis al redakcioj kun koncerna artikolo. Zprávy — Informoj de ĈSEK abonis pere de nia klubo 70 abonantoj.

Kroužek esperanta při SZK-ROH v Šumperku zahájil dne 11. listopadu 1966 na podnět IOE (Intituto por Oficialigo de E.) cestovní premiový kurs esperanta pro začátečníky. Sestavili jej Tibor a Antony Sekelj a vyučuje se moderní audovizuální metodou pomocí diapozitivů, magnetofonu a učebních textů. První díl nejlepší absolventi budou odměněni bezplatným 14-denním pobytem v Belgii, Jugoslávii a Maďarsku, kde si budou moci ověřit získané vědomosti.

Slávka Vránková

Zpráva o 2. TAJE — Olomouc 3.-4. IX. 1966

Zasedání se zúčastnilo 44 delegátů z celé republiky a 8 hostů. V době konání aktivu probíhala v Olomouci celostátní výstava cestovního ruchu, jíž jsme se rovněž zúčastnili. Několik esperantistů poslalo aktivu blahopřejné dopisy, zdravice a telegramy. Veřejnost byla informována zprávou v denním tisku i aktualitou v televizních novinách. Ve dnech jednání byl rovněž učiněn pokus o radiové spojení s esperantisty jiných zemí.

Hlavní referát o pracovním období 1965-66 měl vedoucí Sekce mládeže ČSEV s. Mikuláš Nevan. Podstatnou část otiskujeme na jiném místě, v esperantském znění.

Poŝtkartojn kun ilustraĵo de nacia artisto Martin Benka eldonis Esperanto-rondeto ĉe Domo de Kulturo de RS Maŝinfabrikoj de Turiec en Martin. Interesuloj skribu al adreso: Esperanto p. f. 80, MARTIN.

Ni gratulas al s-ano Antonio Cikhart, Žižkova 61, Havlíčkův Brod, kaj deziras al li sanon kaj pluan aktivadon. La 3-an de novembro 1966 li ĝisvivis sian 80-an jaron. Li estas diligenta tradukanto en Esperanton laŭ propra intereso. Esperantisto li fariĝis antaŭ 7 jaroj.

Estas fondita Medicina Sekcio de ĈSEK. La jarkunvenon de Universala Medicina Esperanto-Asocio, dum la 51-a UKE en Budapeŝto partoprenis ankaŭ kelkaj ĉeĥoslovakaj medicinistoj. Hejmenveninte ili daŭrigis la kontaktojn inter si kaj la ĝenerala sekretariino D-rino Jarnuszkewicz en Krakovo. Rezulte de tio la plenkunsido de ĈSEK en Ostrava aprobis la proponon de prepara komitato kun jenaj funkciuloj: prezidanto Josef Ed. Ambrož (Špačkova 3, Brno-Židenice); vicprezidanto D-ro Ludoviko Izák (Vilao Esperanto, Rastislav-str. 13, Martin); sekretario D-ro Josef

Hradil, (Český Dub 137/III, okr. Liberec).

Ĉiuj medicinistoj (kuracistoj, flegistoj, apotekistoj, sanitariistoj ktp.) ĉu aktivaj aŭ en pensio, estas petataj tuj sendi aliĝilon al D-ro Hradil kaj sciigi precize siajn nomon kaj adreson, kiu kompilas la liston de ĉeĥoslovakaj medicinistoj-esperantistoj. La fonda kunveno de Medicina Sekcio de ĈSEK okazos dum la Esperantista Kulturfestivalo en Opava 7.-10. 7. 1967.

Esperanto-kurso en Pionierske Noviny (Pionira Gazeto) estas aperigata laŭ la teksto de J. Heimlich. Ĝi estas grava sukceso de niaj Bratislavanvoj. Koran gratulon!

ZPRÁVY ČESKOSLOVENSKÉHO ESPERANTSKÉHO VÝBORU — INFORMOJ DE ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO-KOMITATO. — Vydává — Eldonas: Osvětový ústav v Praze, Blanická 4, Praha 2. Rediguje — Redaktas: Dr. L. Izák — s redakčním výborem — kun la redakta komitato: J. Cíchová, ing. Ed. Felix, Zd. Hršel, O. Kníchal, M. Lukáš, Dr. T. Pumpr, Ing. Fr. Sviták, Ed. V. Tvarožek, J. Vondronšek. Tisk — Preso: Tlačárne Slov. nár. povstania, Martin. V-15*71103.